



ESPERANTO

JANUARO 1963

56 a Jaro - N-ro 686 (1)

esperanto

JANUARO 1963

56 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 686 - (1)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
D-ro V. Sadler, adreso ĉe la Centra Oficejo.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1963): 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarife por reklamoj :

1 pago 128,— gld, 1/2 pago 64,— gld, 1/4 pago 32,— gld.
1/8 pago 16,— gld, 1/16 pago 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Teksto de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 85 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avernue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odynca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

Kies flagoj sur Kilimanĝaro? (Vidu paĝon 17)

Enhavo

Tokio invitas vin	1
El la Redakcio	2
1963 — Junulara Jaro	3
Sofia Arta Festivalo	4
Bulgaraj Bildoj	5
Azia Strategio	7
Letero al Vi	10
Esperanto-Kalendaro	10
La Haristo (<i>Huysmans</i>)	11

Rubrikoj

Internaciaj Konkursoj	9
CED	12
Ricevitaj libroj	13
La Juna Vivo	14
Nia Forumo	16
Tra la Mondo	16
Radio	18
48-a U.K.	18
Oficiala Informilo	19
Esperantista Vivo Kovrilo	3


Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Tokio Invitas Vin

Prof. D-ro Hideo Yagi
Prezidanto de UEA:



La kongresejo de la 50-a U.K. en Tokio

Ĉe la komenco de la nova jaro 1963 mi deziras al vi ĉiuj membroj de UEA kaj ankaŭ al ĉiuj Esperantistoj en la mondo feliĉan novjaron, sanon kaj prosperon. Nova jaro kutime alportas al ni novan senton kaj freŝan inspiron. Ni esperu ke tiu ĉi nova jaro estu fruktodona por nia movado kaj ni laboru kun freŝa energio por nia komuna afero!

Vi scias ke la Komitato de UEA konstatis en Kopenhago dum la lasta Universala Kongreso la notindan fakton, ke en 75 jaroj de sia ekzistado kaj ĉiam pli vasta aplikado en la internacia praktiko, Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon kun propra, vere internacia spirito kaj fariĝis jam vere matura kiel instrumento de internacia komunikado, arta esprimo kaj lingvo de la scienco. Ni komprenu tiun ĉi fakton kun ĝojo kaj instigu nin mem por nova laboro, kiel progresigi la aferon unu paŝon antaŭen. Por nia nova laboro, mi estas certa, ke *harmonio inter ni* estas necesa, paca, amika kunhelpo estas absolute bezonata. Ĉiam ni laboru manon en mano; ni "bataladu kune tenataj per unu bela espero" kaj neniam forgesu ke "unuco estas forto". Jes, *nur per unuco* sur nia agadkampo ni povos venki kaj atingi nian celon...

La Universala Kongreso en Tokio, 1965, estos epokofaranta ne nur en la historio de Esperanto, sed ankaŭ en la problemo de lingvo internacia. La Kongreso estos la 50-a jubilea! Unue en la


historio de Universalaj Kongresoj urbo ekster Eŭropo aŭ Ameriko invitas ĝin. En Azio, kie sin trovas dekoj da lingvoj kaj centoj da dialektoj, Esperanto montros sian unikan kapablon kiel vere intergenta lingvo kaj konvinkos la tutan Azian loĝantaron per la unika lingvo kaj la bela homama idealo. Sukceso de la Tokio-Kongreso fariĝos granda mejloŝtono por estonta evoluiĝo de Esperanta movado. Mi invitas vin ĉiujn al Tokio. Mi kore deziras vian aliĝon. Jam de januaro 1963 la Centra Oficejo de UEA, Rotterdamo, povas akcepti vian aliĝilon. Tio estas eksterordinara afero, akcepti aliĝilon de antaŭ tri jaroj. Sukcesigu nian Jubileon per via ĉeesto! La Loka Kongresa Komitato okupas sin fervore por la preparo. La Kongresejo estas jam decidita.

Tokia Kultura Domo en Ueno Parko estos nia kunsidejo (Foto); bela, moderna kaj perfekte ekipita.... ĝi estas simbolo de la nova japana kulturo tre taŭga por kunveno de pacaj batalantoj. La Komitato ankaŭ diskutas multe kiel gastigi vin aliĝontojn por doni al vi bonan impreson kaj ĝojan atmosferon pri pure japana afero kaj al vi certe ekzotika lando. Tokia Kongreso montros al la mondo gravan signifon de Esperanto kaj helpos alporti ĝojan venkon al Esperantistoj. D-ro Zamenhof diris, "forte ni staru, brave laboru, kuraĝe, ho nia rondo! Nia afero kresku kaj floru per ni en tuta la mondo!"

El la Redakcio

Per tiu ĉi numero de "Esperanto" mi adiaŭas la legantojn kiel ĝia redaktoro. Jam delonge montriĝis ne tro oportune, redakti la revuon en unu lando kaj presigi ĝin en alia; la surprize longa tempo bezonata por ke eĉ ekspresa poŝtaĵo atingu Nederlondon el Skotlando kaj inverse pli ol unufoje malfruigis la aperon de la gazeto; krom tio, ĝi ankaŭ malhelpis ĉiaman aktualecon de la enhavo. Plej oportune estus, se la revuon oni redaktus en la C.O., ĉar la kontaktoj kun la presejo estus rektaj kaj tujaj, sed unue la C.O. jam havis sufiĉe multo da laboro, kaj due en la C.O. ne troviĝis sperta redaktisto. Nun, feliĉe, la C.O. havos novan oficiston, kiu samtempe estas kompetenta labori kiel redaktoro: D-ro Victor Sadler, kiu ne nur ekhavis firman reputacion en niaj literaturaj rondoj, sed ankaŭ, kiel estas konate, laboradis por Esperanto dum la lastaj monatoj en Cejlono, kie li atingis gravajn rezultatojn. El ĉiuj vidpunktoj, do, li estas la ĝusta persono por redakti la oficialan organon de nia Asocio. La transiron de la redaktado al Roterdamo mi rigardas kiel gravan paŝon antaŭen.

Mi demisias de la redaktora posteno kun miksitaj sentoj. Unuflanke, la regula kaj tre peza laboro vespere, post normale laciga profesia labortago, estis por mi granda ŝarĝo, kiu ne ĉiam bonefikis al mia sano; sed aliflanke, transpreninte en la fino de 1955, ĝuste antaŭ la transigo de nia centro al Roterdamo, la redaktadon de la organo de UEA, kaj iom post iom muldite ĝin laŭ miaj konceptoj (en amikeca kunlaborado kun la Ĝenerala Sekretario, la Direktorino kaj la Estraro), mi ne povas ne rigardi ĝin iomete kiel mian infanon, kies sorto fariĝis al mi ege kara; kaj, kvankam ne mankos al mi en la estonteco sufiĉe da laboro por Esperanto (interalie mi estas, kiel konate, la redaktoro de la nova kultura revuo de UEA, "Monda Kulturo"), al mi tre mankos la vigla kontakto



kun la plej diversaj esperantistoj en ĉiuj mondpartoj, kiun alportis al mi ĉiutage la peza poŝto, kaj la eterna luktado por prezenti al la legantoj ekvilibran kaj tamen varian enhavon.

Sed nia afero rapide evoluas, kaj al tio nia movado devas adaptiĝi. D-ro Sadler estas mia bona amiko, kaj al li mi volonte transdonas la zorgojn, plene fidante, ke li gvidos la revuon al novaj sukcesoj.

En tiu ĉi adiaŭa momento mi tre bone konscias miajn mankojn, kaj mi pli ol iam antaŭe bedaŭras miajn diversajn pekojn dum mia redakta periodo. Espereble la legantoj scios pardoni tiujn al mi. Se io estis malbona en mia redaktado, certe ne kulpas miaj kunlaborantoj, al kiuj mi nun deziras esprimi mian varman kaj sinceran dankon. Al tiuj, kiuj ne ŝparis penojn por kontribui al "Tra la mondo", kaj tute speciale al s-ro Giloteaux el Francujo, kiu estis vere modela kaj konstanta kunlaboranto sur tiu kampo; kaj al la redaktoroj kaj respondeculoj de la diversaj rubrikoj, mi agnoskas mian tre grandan ŝuldon.

Mi do tre petas niajn kontribuantojn kaj legantojn bonvenigi D-ron Sadler, kaj doni al li tiujn helpon kaj komprenemon, kiujn ili senmanke donis al mi. Bonvolu nepre atenti, ke ekde nun ĉio por la redakcio de "Esperanto" devas esti direktita al la adreso de la C.O. en Roterdamo.

William Auld

1963 - JUNULARA JARO

La Esperanto-Movado startis sian vivon kiel juneca. Zamenhof estis ankoraŭ vere knabo, kiam li komencis okupiĝi pri la ideo. Li estis nur 28-jara kiam li publikigis sian projekton kaj prenis sur sin la gigantan taskon disvastigi ĝin tra la mondo. La altaj lingvaj kvalitoj de Esperanto kaj la ideo de plej pura internaciismo, ligita al ĝi, inspiris junajn intelektulojn en unu lando post la alia.

Ne necesas ĉi tie rerakonti la diversajn eventojn en la historio de Esperanto. Sufiĉas memori, ke la Unua Mondmilito detruis multilate la florantan Movadon; ke, pene rekonstruita post la finiĝo de la malamikaĵoj, la Esperanto-Movado suferis aliajn fortajn batojn en formo de malpermesoj kaj persekutoj en aro da landoj; ke, interne, organizaj kaj aliaj diskutoj, kelkfoje superflujaj disputoj, deturnis la agadon for de la esencaj celoj. La finan baton donis la Dua Mondmilito, kiu preskaŭ komplete haltigis ĉian organizitan laboron. Post la finiĝo de la milito la unua tasko estis rekolekti la restintajn fortojn, bedaŭrinde dekumitajn kaj tre diserigitajn. En ĉiuj niaj organizaĵoj, ekde la lokaj grupoj ĝis la Komitato de UEA, mankis junaj, freŝaj fortoj. Necesis trovi radikalajn rimedojn por sanigi la situacion.

La reorganizo de TEJO kaj akcepto de ĝia nova Statuto en 1957, la transformiĝo de nia junulara organizaĵo al sekcio de UEA, la kreo de junularaj delegitoj, la speciale favoraj kotizoj por junuloj, la apartaj junularaj kunvenoj dum la U.K., la Oratoraj Konkursoj kaj aliaj aranĝoj por la junularo, la klopodoj, parte sukcesaj, fondi landajn junularajn sekciojn, la apartaj kongresoj de TEJO, diversaj elstaraj junularaj renkontiĝoj, pluraj gazetoj kaj bultenoj eldonataj de la junularo mem — ĉio ĉi kontribuis al disvastiĝo de la Internacia Lingvo inter la junularo kaj al la fortiĝo de la junulara Esperanto-Movado.

Nun, en la kadro de la nova Laborplano de UEA, la junulara sekcio akceptis sian propran Laborplanon, kies ĉefa celo estas amase disvastigi la lingvon inter la junularo. En ligo kun tiu granda programo la Estraro de TEJO turnis sin al la Estraro de UEA kun la propono, ke la jaro 1963 estu deklarita Junulara Jaro. Per skriba voĉdono la Estraro de UEA akceptis la proponon kaj tiamaniere tiu ĉi nova kampanjo estos komuna klopodo de Tejo kaj UEA, sed la ĉefajn agadojn entreprenos TEJO mem pere de siaj funkciuloj kaj landaj sekcioj.

Interne de la Movado la agado havas jenajn ĉefajn celojn: fondi junularajn sekciojn en la landaj asocioj kaj lokaj grupoj, se tiaj ankoraŭ

ne ekzistas; organizi apartajn junularajn grupojn, se iel eble; regule aperigadi junularajn paĝojn en ĉiuj organoj de la landaj asocioj kaj, laŭ la ebleco, ankaŭ en aliaj gazetoj; dediĉi specialan atenton al la junularaj problemoj ĝenerale en la Esperanta gazetaro; organizi apartajn junularajn programojn en la lokaj grupoj; okazigi junularajn kunvenojn dum la landaj kongresoj en 1963; organizi oratorajn konkursojn por la junularo dum la landaj kongresoj kun subvencioj al la gajnintoj por partopreno en la Oratora Konkurso dum la U.K. en Sofio; pligrandigi la nombron de Junularaj delegitoj de UEA, de J-MJ kaj J-MA de UEA — ĉio ĉi kun la fina celo fortikigi la junularan sektion de UEA kaj, sekve, de la Movado ĝenerale.

Ekster la Movado la plano antaŭvidas intensigon de la agado en ĉiuj junularaj medioj, sed tute speciale en la universitatoj kaj lernejoj. TEJO prizorgos publikigon de artikoloj kaj informoj pri Esperanto en la internaciaj kaj landaj revuoj kaj aliaj periodaĵoj por la junularo; organizos prelegojn en neesperantistaj junularaj asocioj, universitatoj kaj lernejoj; distribuos informan materialon utiligante tiucele ankaŭ la ekzistantajn flugfoliojn de UEA, la bultenojn de la IGS kaj la dokumentojn de CED; malfermos novajn kursojn por gejunuloj kaj, se eble, aperigos kursojn de Esperanto en junularaj periodaĵoj.

La Estraro de TEJO prave opinias, ke mankas en Esperanto revuo, kiu estus plene dediĉita al demandoj interesaj por la junularo. Tial TEJO intencas eldonadi, ekde januaro 1964, internacian junularan revuon ne pri Esperanto, sed en Esperanto pri ĉio, kio povas interesi junajn homojn en ĉiuj landoj. La provnumero verŝajne aperos antaŭ la U.K. en 1963, tiel ke estos eble kolekti abonojn dum la Kongreso kaj la diversaj aliaj renkontiĝoj ligitaj al ĝi. Por certigi la eldonadon TEJO decidis krei Fondaĵon, kiun prizorgos la C.O. de UEA. Kontribuojn oni povas sendi al la C.O., eventuale pere de la ĉefdelegitoj kaj perantoj.

La esperantista junularo montris admirindajn talenton kaj kuraĝon en la laboro por la Internacia Lingvo. Nun, en la Junulara Jaro, ĝi estas preta ĝis maksimumo streĉi siajn fortojn por disvastigi amase la lingvon inter la gejunuloj. Ĝia laboro estos tutcerte plensukcesa, se ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj la tuta Esperantistaro rilatos al ĝi kun multe da komprenemo kaj donos al ĝi ĉiuf flankan apogon, inkluzive almenaŭ modestan financan helpon.

Ivo Lapenna

SOFIA ARTA FESTIVALO

La Sofia L.K.K. firme kaj regule laboras por pretigi al ni imponan 48-an Kongreson, kiu plie anonciĝas bona pro taŭgaj ejoj kaj efika pro la favorado de la aŭtoritatoj. Karakterizo de la 48-a estos la Dua Arta Festivalo.

Nia movado estas kulturmovado kaj U.E.A. asertas tion jam de pluraj jaroj per la seninterrompa organizado de diversaj manifestacioj, kiel la Internacia Somera Universitato, la Belartaj Konkursoj, la Oratora Konkurso, la Teatra Vespero..., ktp.... Esence la Arta Festivalo estas festa aserto de nia kulturo. Nia informado kompreneble devos ekspluati tiun manifestacion. Sed nur per la kulturo, kiun ĝi kapablas disradii, lingvo povas venki.

Ĉiuj legantoj de tiuj linioj povas iel partopreni en tiu alta manifestacio. De la ordinara pasiva partopreno, "aĉetebla" per simpla kongreskarto, ĝis la plej eminenta aktiva kunlaboro spirita aŭ materiala: de ĉiu el vi dependas la suma nivelo, kiun ni povos atingi. Ĉiu el vi portu sian brikon al la komuna konstruo.

Kvankam ne ĉiu detalo estas jam fiksita, kiam tiuj linioj estas skribataj, ni tamen povas diri, ke krom la oficiala teatraĵo prezentota de la Internacia Arta Teatro sub la kompetenta reĝisorado de Srdjan FLEGO, ni povos ĝui la partoprenon de alia profesia trupo, tiu ĉi bulgara. Ni jam disponas ankaŭ pri bulgaraj operkantistoj kaj ankaŭ pri bulgaraj folkloraj dancembloj, kies ĉarman kaj viglan movevoluon ni povos admiri sub la blua Sofia ĉielo en grandega plenaera teatro kun 3 500 sidlokoj. Plie, espereble, aliaj trupoj volos anonci sian partoprenon: ili urĝe skribu al L.K.K. aŭ al subskribinto.

Niaj verkistoj tra la tuta mondo febre pretiĝas partopreni la Belartan Konkursan. Ili scias, ke dank' al ili iom post iom la eksteraj skeptikuloj agnoskas la valoron de nia lingvo. La Belarta Konkurso estas sprono, kiu instigas al ĉiam pli bona kaj pli abunda verkado. Tial kleraj homoj en nia movado, eĉ se ili ne havas talenton aŭ tempon por tiu aktivado, vigle subtenas ĝin. Iom pli solena vespero estos dediĉita al tiu Konkurso: espereble kelkaj mecenoj decidiĝos krei specialajn premiojn okaze de la Festivalo kaj ni povos solene proklami la rezultojn.

Kvankam eminenta parto, literaturo ne estas la tuta kulturo: tiu ja ne lasas sin enfermi en formulon. Tial multe dependas de individuaj iniciatoj, ke tiu aŭ tia aspekto de la internacia kulturo estos reprezentita en la Sofia Festivalo kaj en la sekvontaj. Tial ĉiu ajn povas partopreni kun sia aparta talento kaj kompetento: Ekzemple, multaj homoj ŝatas foti tra la mondo;


elito levis tiun emon al vere alta artesprimo. Okazos en Sofio Foto-Konkurso "La Homo" sub prizorgado de la Bulgara Esperanta Kino- kaj Foto-Klubo. Internacia Komisiono aljuĝos premiojn kreitajn de diversaj instancoj kaj eble de mecenatoj.

La estraro de U.E.A. ĵus decidis pri la temoj proponitaj al niaj junuloj por la Oratora Konkurso. En la kadro de "1963- Junulara Jaro", T.E.J.O. harmonie kun U.E.A., invitos ĉiujn landajn asociojn organizi proprajn oratorajn konkursojn, okaze de siaj kongresoj. La celo estas trovi talentajn junulojn, kiuj poste povu esti senditaj al Sofio por partopreni la Konkursan de U.E.A., kiel reprezentantoj de siaj landoj. La naciaj asocioj, bone komprenante la proprajn interesojn, monhelpos la talentajn junulojn tiel donante al ili fidon kaj celon en nia movado. Novaj talentoj de hodiaŭ, gvidantoj de morgaŭ!

Ni ĉi tie deziris aludi nur kelkajn el la ĉefaj punktoj de la Sofia Arta Festivalo. Plie, novaj aktivadoj dependos ĉefe de la reago de la publiko: ekzemple, ni antaŭvidas diversajn konkursojn de deklamado, plastikaj kaj figuraj artoj, lumbildoj, magnetofonaj bendoj, ... ktp, ... Ni havos okazon reparoli pri tio. Ni nur ripetu: la Arta Festivalo estos respeguliĝo de nia tuta movado. La programo estas vasta, kaj ĉiu serioza iniciato estos bovena.

La Sofia Arta Festivalo superu la Harogatan! Ĝi pretigu la vojon al estontaj!


D-ro Andreo ALBAULT
Estrarano de UEA pri
Kulturaj Aferoj.



Kongreslanda pejzaĝo

Bulgaraj Bildoj

„.... Estis iam mirinda lando. La arboj estis arĝentaj kaj iliaj fruktoj oraj. La infanoj en tiu lando estis gajaj kaj feliĉaj...” (Fratoj Grimm)



Mi memoris tiun ĉi fabelon kiam por la unua fojo mi vizitis la belan Rila-montaron kaj ĝian neforgeseblan monaĥejon.

Estis varma aŭtuna tago, la plej bela periodo en la jaro por esti en la arbaro. Kaj arbaroj estas en tiu regiono — ho, kiom multe da ili — kaj la montoj estis kovritaj de mirindaj oraj, ruĝaj, verdaj koloroj. Absoluta trankvilo regis tie. La posttagmezaj sunradioj dancis kun la folioj super mia kapo. Nur la bruo de miaj paŝoj kaj, de tempo al tempo, la kutimaj arbaraj sonoj rompis tiun grandiozan kaj ripozigan silenton.

Sed subite renkonte al mi, de la supro de monto, kiun mi estis grimpanta, venis ĉarma kanto el junaj voĉoj. Pli kaj pli ĝi kaj mi alproksimiĝis kaj jen! subite du..., kvar..., dek..., dudek... infanoj aperis antaŭ mi kaj min ĉiuj gaje salutis kaj preterpasis malsupren, gaje kantante.

Tio portis al mi memorojn pri mia infana aĝo; mi volis postkuri ilin kaj krei — prenu ankaŭ min kun vi; donu ankaŭ al mi iom de via gajeco — kaj mi havis strangan senton. Ĉu envio? Certe ne! Min ĝojigis la ĝojo de tiuj infanoj, ilia senzorga vivo, ilia feliĉo, kaj mi vidis realigita la malnovan fabelon de la fratoj Grimm:... mi vidis la mirindan landon kie la arboj estas arĝentaj, iliaj fruktoj oraj kaj kie la infanoj vivas gajaj kaj feliĉaj. Ĝi estas Bulgarujo...

Kutima kluba vespero. Granda salono plenuma. En la programo: parolado fare de unu el la klubanoj pri "Kredu min, Sinjorino!" de Cezaro Rossetti.



La parolanto, en plaĉa kaj interesa maniero, prezentas la konatan verkon al la atenta aŭskultantaro. Je la fino de la parolado estiĝas vigla diskutado pri la priparolita verko inter la parolinto kaj la aŭskultintoj — tio estas kutimo en tiu klubo. Dua parto de la programo: pritrakto kaj diskuto de klubaj aferoj. Leviĝas impona viro, la kasisto de la klubo — grava persono. Li aspektas ĉagrenita. — Kamaradoj, li komencas, kiel kasisto de la klubo mi devas atentigi vin ke ĝis nun *nur* 330 anoj pagis sian jaran kotizon. Hodiaŭ vespere mi invitas la ĉeestantajn nepagintojn veni tuj al mi kaj pagi sian ŝuldon. — Pli ol deko da homoj rapidas al la kasisto kaj, pardonpetante, plenumas sian devon.


Ĉu nova skeĉo de Marjorie Boulton? Ne! Reala vivo de reala esperantista klubo: "Maksim Gorki", unu el la kluboj en Sofio. Kaj mi persone ĉeestis.

(Poste mi informiĝis kiom da anoj havas tiu klubo: pli ol 500, estas la respondo)....

En Bulgarujo ekzistas mahometanoj, ortodoksoj, katolikoj, protestantoj kaj ateistoj. Ĉiuj vivas en paco kaj neniu perfortas alies konvinkon.

Pro tio, dank'al ortodoksa pastro, mi povis viziti, la unuan fojon en mia vivo, moskeon kaj eĉ supreniri, ĝis la pinto, ĝian minareton.

Tio okazis en Plovdiv, unu el la plej interesaj urboj en Bulgarujo. Per sia malnova parto, kun ĝiaj malnovaj, sed bone konservitaj dometoj, kun ĝiaj grimpantaj kaj mallarĝaj stratetoj — ofte la tegmentoj de konstruaŭstarantaj domoj formas portikon —, Plovdiv estas paradizo por la fotoamantoj. De iu ajn el la kvin montetoj, sur kiuj troviĝas la urbo — nememorigeblajn nomojn turkdevenajn ili havas — oni ĝuas mirindan vidon al la montoj kaj al la valo. Ĉe la piedoj fluas trankvile Marica...



En Vraca, dum du tagoj, mi estis oficiala gasto de la urbestro. En tiuj tagoj, eĉ en oficiala formo, mi spertis kaj ĝuis la grandanimecon de la bulgara popolo.

Per speciala aŭtomobilo mi vizitis la belegajn lokojn (Groto "Ledenika"!), kiujn la partoprenantoj en la 19-a TEJO-Kongreso ankaŭ vizitos. Mi ĥore kantis kun la urbestro dum du oficialaj bankedoj — ha, kia vino, kia vino! — kaj brak' en brako, en la nokto ni akompanis hejmen unu la alian...

En Sofio, ankaŭ dank' al la larĝaj bulvaroj, la aŭtomobila trafiko fluas rapide kaj tre... itale. La piedirantoj devas konkuri en rapideco kun la aŭtomobilistoj por atingi, kun ĉiuj membroj sanaj, la alian bordon de la strato.

Plej sekure estas transiri straton kie troviĝas trafikpolicisto. En unu el la stratkruciĝoj sur la bulvardo Ruski, unu el la ĉefaj en Sofio, daŭre staras amaso da homoj. Sed ili ne staras por havi liberan kaj sekuran vojon je transiro. Tute ne! Ili staradas por admiri la policiston, ĉiam la saman, kiu direktas tie la trafikon. Per la movoj de siaj brakoj kaj de la tuta korpo li elvokas strangan baletdancon. Preskaŭ ĉiuj sofianoj konas bone sian urbon, sed ĉiuj sofianoj tiun policiston.

Bulgarujo: la lando kie la homoj neas kapjesante kaj jesas kapneante. Eksterlandano neniam forgesu tiun ĉi kutimon. Ankoraŭ pli



bone: li devigu sian kapon ne moviĝi kaj elparolu klare sian jeson aŭ neon.

Tiu ĉi estas la sola maniero por eviti miskomprenojn. Ne faru kiel mi, kiu plurfoje ne ricevis deziritajn kaj proponitajn aferojn, ĉar en tiuj momentoj estis forgesinta la kutimon....

Mi ĉiam havis la ideon, pro antaŭaj spertoj, ke vojaĝo per aviadilo estas rezervita al bonstataj homoj, al aferemaj komercistoj, kies "time is money". Mi do tre miris kiam dum mia unua vojaĝo en Bulgarujo per aviadilo sidis apud mi simpla kamparanino kun korbo, el kiu bone vidiĝis mortinta kokino. Kaj tiajn homojn mi plurfoje vidis dum aliaj vojaĝoj.

La kaŭzo estas ke la kostoj pro aviadila vojaĝo estas proksimume kiel tiuj per vagonaro. Krome Bulgarujo havas multajn montojn kaj vojaĝo per aviadilo estas multe pli rapida....

Por la unua foja mi vivis dum relative longa tempo en la kirila alfabeto. En la komenco estis vere stranga sento, kiun mi havis. Mi estis ĉirkaŭita de vortoj, kiuj ne estis vortoj por mi, sed nur strangaj signoj. Dum la sonĝoj faladis sur min literoj, kiujn neniam antaŭe mi estis vidinta, kiel Ж aŭ Ф aŭ Ш aŭ Ю kaj literoj kiel Р, kiu signifas R, aŭ В, kiu signifas V, aŭ Н, kiu signifas N, aŭ м, kiu signifas T (kvankam estas ankaŭ Т, kiu signifas T, kaj М, kiu signifas M).

Vere en la unuaj tagoj mi estis senespera. Sed mi devas konfesi ke la kirila alfabeto estas facile lernebla. En la daŭro de unu vespero oni povas ĝin lerni kaj poste..." la vivo estas rozkolora".

G. G. Pompilio

AZIA STRATEGIO

Victor Sadler

Li montris al mi reliefan portreton de L. L. Zamenhof: memorigilon pri la 3-a Universala Kongreso, en Kembriĝo, 1907. "Hejme mi havas grandan kolekton de Esperantaj libroj" — li asertis — "tie estas libroj, kiujn vi neniam vidis." Por kroni sian eminentecon, aldonis la ebria sinhala maljunulo: "Mia patro korespondis kun Zamenhof!" Dum mia restado trimonata en Cejlono, mi ofte renkontis, se ne pionirojn alkoholismajn, tamen homojn, kiuj "aŭdis ion pri Esperanto — antaŭ multaj jaroj", aŭ "eklernis ĝin antaŭ 25 jaroj" aŭ sciis, ke "multaj Cejlonanoj interesiĝis pri ĝi antaŭ la milito". Post kelkaj tiaj intervjuoj mi do ekhavis la impreson, ke mi devas ja kuregi por resti sur sama loko: ke necesas multe da laboro nur por reveni al antaŭlonga situacio.

En tuta mondo estas jam konata vero, ke nia movado devas elspezadi amason da mono kaj laboro nur por ne perdi jam akiritajn poziciojn. En Azio tamen tiun principon pligravigas alia faktoro: la ĉie priparolata "eksplodo" de loĝantaro. Signifas, ke en ekzemple Britujo, kie la loĝantaro pli malpli stabiliĝis, ĉiu nova lernanto de Esperanto estas pozitiva gajno, dum ke en Cejlono, kies popolo kreskegas de jaro al jaro, necesas unue varbi multajn lernantojn nur por tio, ke la elcento de Esperantistoj ne malkresku.

Kiam Esperantisto pensas pri Azio, li tiam pensas pri Japanujo. El la membraro de UEA, ĉirkaŭ 95% estas eŭroplingvanoj. Ke ni havas eĉ 5% da alilingvanoj, tion ni dankas unuavice al japanoj. La eŭropa opinio pri la forteco de japana Esperanto-movado estas verŝajne troigita, sed kompare kun aliaj aziaj landoj, en tiu lando Esperanto firme ekzistas. Kial do, Esperanto ne progresis samgrade en ekzemple Hindujo, kiel en Japanujo?

Unu respondo jam estas ŝupre sugestita: Japanujo samkiel eŭropaj landoj plejparte sukcesis per drasta utiligo de naskolimigo kaj aliaj rimedoj jam stabiligi sian loĝantaron: la nuna cifero, ĉirkaŭ 95 milionoj, ne multe ŝanĝiĝas. Sed la plimultiĝo de hindoj neniel montras haltemon. Alia respondo, ligita kun tiu pri loĝantaro, estas tio, ke Japanujo jam delonge industriiĝis. Tiu fakto implicas multajn avantaĝojn rilate Esperanton. Por substreki tiujn avantaĝojn, mi uzos la teknikon de kontrasto. Cejlono estas kontrastebla lando. Tie, en lando

sen industrio, letero sendita de unu flanko de la ĉefurbo al alia flanko povas alveni post unu tago — aŭ post unu semajno. Trajno povas ekveturi (kiel mi spertis mem) 90 minutojn malfrue, kaj alveni jam du horojn malfrue. Telefono preskaŭ ĉiutage misfunkcias. Lando senindustria ne povas sufiĉe eksporti, por akiri "firmajn" valutojn: sekve ĝi malvolonte, aŭ eĉ tute ne, permesas transpagi kotizojn al alilanda organizaĵo. Plie, la ĝenerala malriĉeco de popolo senindustria ne permesas al individuoj aĉeti multajn Esperantajn librojn (kies prezoj estas ja altegaj kompare kun ekzemple Usono aŭ Sovete eldonitaj verkoj), nek pagadi eĉ enlandajn kotizojn. Ĉio ĉi signifas kripligajn malhelpojn al organiza laboro.

Iuj azianoj, koresponde intervjuite en "La Suda Stelo", opiniis, ke la okcidenta karaktero de la Esperanta vortaro kaj de iuj ĝiaj gramatikeroj estas ĉefa baro kontraŭ populariĝo de la lingvo en tiu kontinento. Ke tian karakteron la lingvo jes havas, tion oni ne povas serioze nei. Eĉ nur bezono, skribi kaj legi fremdan alfabeton, estas iom grava malavantaĝo. Tamen la "okcidenteco" de angla lingvo neniel malhelpas, ke milionoj da Azianoj lernas la anglan. Krome, tiu aserto ne povas klarigi kial orienteŭropanoj lernas Esperanton pli entuziasme ol siaj okcidentaj najbaroj, por kiuj la vortaro estas pli konata, nek kial japana movado delonge superas tiun de Hindujo: plej multaj hindujaj lingvoj estas ja parencaj al eŭropaj, dum ke la japana havas certe malpli da komunaj trajtoj kun nia lingvo internacia. Se do lingva karaktero de Esperanto malhelpis ĝian progreson en Azio, tio tamen certe ne estis decida faktoro.

Multe pli gravaj ŝajnas al mi la jam diskutitaj malriĉeco kaj kaoseco de iuj Aziaj landoj. Sed unu alia diferenco inter Hindujo kaj Japanujo nepre postulas atenton. Japano kiu ajn povas interkompreniĝi kun samlandanoj ĉie pere de sia propra gepatra japana lingvo. Ne tielas en Hindujo! Tiu lando, samkiel aliaj eksimperieroj, ne estas formita per iaj naturaj lingvaj limoj, sed ĝi estas difinita ĉefe per lingvo de la imperiestra lando. Kvankam laŭ antaŭnelonga plano la sendependiĝon de Hindujo kronus post 1965-a jaro definitiva forlaso de angla lingvo kaj plena oficialigo de hindia lingvo kiel tutlanda, tamen en oktobro 1962-a ĉefministro Nehru, por pacigi ĉefe sudhindojn kaj

bengalojn devis jam refoje prokrasti tiun paŝon, deklarante, ke post 1965 la angla lingvo restos ankoraŭ plenrajta "kunlingvo" (associate language) oficiala. Hodiaŭa efektiva situacio estas tia, ke ĉiu enlande vojaĝanta hindo, krom se li estas escepta plurlingvulo, devas paroli ĉie la anglan lingvon, kaj plie ke por ĉiuj administraj oficoj kaj pli gravaj profesioj la angla estas ne malhavebla. Sekvas, ke neniuj hindo lernos Esperanton, ĝis ke li jam sufiĉe bone estris la anglan, ĉar per la angla li gajnos siajn vivrimedojn — por Esperanto li devos perdi monon.

Se ni komparas Hinduojn kun Eŭropo, ni do vidas, ke la problemon de interpopola lingvo iagrade jam solvis britoj, devige trudante sian lingvon al la tuta kontinento. Eŭropon, aliflanke, ankoraŭ neniuj imperiestroj subjuĝe tute unulingvigis. Cetere britoj "donacis" sian lingvon ne nur al Hindujo, sed ankaŭ al Cejlono, Birmo, Malajo, Nepalo, Pakistano, Singapuro kaj Hongkongo. Usonanoj saman lingvon enkondukis en Filipinajn Insulojn kaj enkondukas en Japanujon. Resume, estas relative malmultaj hindoj, kiuj interesiĝas pri aliaj landoj; el tiuj ankoraŭ malpli multaj havas financan rimedon por vojaĝi alilanden; el tiuj nur malgrandega nombro ricevas registaran permeson por vojaĝo; kaj fine, tiuj malmultaj feliĉuloj jam per angla lingvo kontentige interkompreniĝas en plej multaj aziaj landoj. En Eŭropo, vojaĝo alilanden postulas trajne nur horojn; en Azio temas pri tagoj aŭ eĉ semajnoj. Entute do oni deve konkludas, ke por azianoj la deziro aŭ bezono je internacia lingvo estas multege malpli urĝa, ol por eŭropanoj. Sekve oni devas supozi, ke se temas nur pri tiu flanko de la lingva problemo, do la elcento de Esperantistoj en Azio devus ĉiam resti sub la eŭropa cifero.

Mi supre konstatis, ke Esperanto ne estas progresinta, kaj eble eĉ malprogresinta, en la hinda kontinento. Kial lerni Esperanton, se oni ne povas iri alilanden, ne povas aliĝi al internacia organizaĵo, kaj ne havas monon por aĉeti Esperantajn librojn (kiuj bezonas ĝis tri monatojn inter mendo kaj ricevo)? Ja restas nur korespondebleco... Ne mirinde, se tieaj societoj malfacile establiĝas, tro facile forvelkas.

Post tiaj konstatoj povas mirigi jena fakto: en preskaŭ ĉiu hinda aŭ cejlona ĵurnalo (ili estas multaj) aperas ĉiutage almenaŭ unu artikolo, letero aŭ informo pri "la lingva problemo". El plurmonataj studoj mi ne hezitas konkludi, ke la lingva problemo de tiu regiono estas efektive multe pli grava ol tiu de Eŭropo. Por forigi ĉi tiun ŝajnan paradokson mi tuj aldonu, ke temas pri du tute malsamaj problemoj. "La" lingva problemo de Eŭropo rilatas al ĉiaj internaciaj kontaktoj voĉaj kaj skribaj. Kiel mi su-

pre klarigis, tiu problemo ekzistas en Azio nur en malalta grado. "La" lingva problemo de Hindujo kaj Cejlono, aliflanke, estas problemo de edukado, t.e. unuavice problemo *enlanda*.

El la fakto, ke aperadas ĉiutage tiom da ĵurnalaĵoj pri tiu ĉi problemo, evidentas, ke mi ne povas en konciza artikolo tuŝi ĉiujn al mi konatajn flankojn ĝiajn. Sufiĉu do jena nuda propoziciaro:

a) Dum la brita regado de la hinda kontinento, instruado meza kaj supera okazis ekskluzive pere de angla lingvo. Unuflanke sekvis, ke neniam mankis taŭgaj lerno- kaj legolibroj; aliflanke sekvis, ke studoj progresis malpli rapide ol en Britujo, unue ĉar oni lernis per fremda lingvo, due ĉar hinda infano devis uzi, por finakiri la anglan, valoran tempon, kiun brita infano dediĉis al pli esencaj studoj.

b) Post sia sendependiĝo, hindaj landoj klopodis kaj ankoraŭ klopodas plivastigi instruadon per indiĝenaj lingvoj. En Cejlono la registaro per anglan instruadon jam forigis tute el multaj mezaj lernejoj kaj celas forigi ankaŭ el superaj edukejoj. Unuflanke sekvas, ke lernanto digestas pli rapide siajn temojn, ĉar ili prezentiĝas en lia denaska lingvo; aliflanke sekvas, ke necesas rekrei en cejlonaj indiĝenaj lingvoj amason da instrumaterialoj jam ekzistantaj en angla lingvo, kaj ke tiu *ne tuj plenumeblo* neceso signifas gravan bridon al progreso de lernantoj.

c) En Hindujo aliflanke, oni klopodas kunfandi sistemojn a) kaj b), instruante per indiĝenaj lingvoj laŭeble, sed samtempe devigante bonan scion de angla lingvo por pasivaj celoj — ĉefe do por legi la vastan anglalingvan literaturon. Ĝuste tian sistemon jam konas eŭropaj landoj, ekzemple Danlando. Ĝi implicas kaj rapidan lernadon per gepatra lingvo kaj abundajn studmaterialojn en fremda(j) lingvo(j).

Hindaj pensuloj ĝenerale rigardas la alternativon c) kiel idealan. Sistemo a) tro gustas je imperiismo; sistemo b) signifas (kiel nun montriĝas en Cejlono) sciencan sinmortigon. La tria varianto efektive jes estas ideala en tiu senco, ke ĝi estas plej bona el la donitaj alternativoj. La sistemo c) funkcias ne malbone en Eŭropo. Ĝi prezentas jes malavantaĝojn: en Britujo studento legas, verkas, diskutas kaj pensas en sia unu gepatra lingvo, dum ke en Danlando li devus eble legi en unu lingvo, verki en alia, kaj pensi iom en ambaŭ. Dano bezonas dediĉi multan tempon al studado pri angla aŭ aliaj fremdaj lingvoj. Se li havas sciencan talenton, sed lingvan maltalenton, do tiu maltalento povas eĉ sufoki la talenton. Sed tiujn rezultajn malavantaĝojn, kompare kun anglalingva lando, eŭropa ŝtato povas eble kompensi per nacilingva eldonado, per pli intensiva studigo ktp., ktp.

— unuvorte: per mono.

Male, en Hindujo, Cejlono kaj aliaj landoj tiel de Afriko kiel de Azio, la popoloj jam ne povas konkurenci ekonomie aŭ science kun ekzemple anglalingvaj landoj. Nek la registaroj povas pagi adekvatan evoluigon de siaj regionaj lingvoj per scienca eldonado kaj per preparado de kompetenta instruistaro, nek individuaj lernantoj povas porti tiun ŝarĝon, ellerni krom sia denaska lingvo (ne ĉiam identa kun regiona) ankaŭ la tutlandan kaj fine la anglan kaj (kiel instigas S-ro Nehru) aliajn okcidentajn lingvojn. Nek ŝtato nek ŝtatanoj povas fronti tiajn obstaklojn sen la konfesinda konsekvenco, ke ilia eduka kaj sciencateknika progreso, jam ĉe pli frua stadio ol en Eŭropo, devas plie malfruiĝi kompare kun tiu de landoj fortaj kaj unulingvaj. (Demandu al kiu ajn instruisto en Hindujo: li respondos, ke la edukado en tiu lando eĉ konsiderinde malprogresis dum la pasinta jardeko.)

La ekzisto de Esperanto ebligas teorie plian alternativon ĝis nun konceptitan, mi kredas, nur en malvasta senco en Okcidento, kaj eĉ tute ne en Afrazio. *Tiu alternativo estas peresperanta edukado en ĉiuj mezaj kaj superaj lernejoj.* La 1-a Internacia Konferenco de Sciencistoj ĉijara en Kopenhago proponis esplori interalie eblecon krei internacian peresperantan universitaton. Tiu koncepto tamen implicas saman malavantaĝon de la supre priskribita sistemo b) — nome, ke mankas lerno-libroj kaj ĉiaj legaĵoj tiulingvaj, kaj ke plie mankas ekonomiaj rimedoj por produkti tiajn materialojn je sufiĉe modera prezo. Do se, ekzemple, Cejlono volus instrui Esperanton en la unuaj lernejoj kaj *per* Esperanto en mezaj kaj superaj lernejoj, ĝi gajnus ja tiun avantaĝon, ke la lernantoj pli rapide kaj pli komplete ekposedus tiun lingvon, ol siatempe la anglan — sed ĝi frontus praktikan neeblecon, eldoni sufiĉan kvanton da libroj en la instrua lingvo, kaj sekve ankoraŭ studentoj bezonus anglan lingvon por legado. Kiel do tioma eldonado povus ebligi? Se ni imagas internacian kontrakton inter plimultaj aziaj kaj/aŭ afrikaj ŝtatoj, ni tiam vidas realan eblecon. Se multaj ŝtatoj adoptus samtempe kaj interkonsente instruadon peresperantan (post kompreneble necesa periodo de prepara lingvoinstruado), do al eldonado de taŭgaj lerniloj en tiu lingvo ili povus dediĉi siajn kunigitajn ekonomiajn fortojn. Tia kunlaboro devus ebligi: 1) rapidan riĉigon de Esperanta scienca kaj teknika literaturo, 2) grandajn eldonkvantojn, kaj sekve malaltajn prezojn, 3) ŝparon de eŭrop-amerikaj valutoj nun elspezataj por okcidentaj libroj, 4) facilan interŝanĝon de instruistoj (eĉ interne de Hindujo tio ne plu eblas nun), 5) liberan interŝanĝon de studentoj, kaj 6) pliunuecigon de Afrazio.

Tia kunlaboro povus fine rezultigi, ke Esperanto fariĝus unu el ĉefaj sciencaj lingvoj de la mondo, kaj sekve devigus ankaŭ okcidentajn studentojn eklerni ĝin. La daŭrigon de tia rezonado mi lasas el legantoj.

La supre priskribita koncepto estas konsentinde ambicia, politike malfacilega kaj nur en daŭro de pluraj jardekoj efektivebla. Sed simpla, sencela enkonduko de Esperanto en lernejojn de Azio en la nuna tempo eĉ ne estas imagebla. Eĉ se registaroj tion volus, tamen la popoloj ne akceptus lerni plian lingvon nur por internaciaj rilatoj. Sole tia plano, kia implicas *malmultigi* la lingvojn lernendajn, havas eblecon akceptiĝi. En Okcidento Esperanto ankoraŭ ne atingis rimarkindajn sukcesojn, eble ĉar por okcidentaj landoj la lingva problemo estas ĝena, sed ne urĝega. En Afrazio, aliflanke, ekzistas en la eduka sfero, kiel mi jam emfazis, efektiva bezono, por kiu ĝis nun troviĝis neniu vere kontentiga solvo. Se ni povos pruvi al Afrazio, ke peresperanta solvo estas plene avantaĝa, nia lingvo faros grandan paŝon.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavio	5560	7170	128.96
2.	Usono	3610	4100	113.57
3.	Francujo	6754	7218	106.87
4.	Svedujo	6190	6615	106.80
5.	Nederlando	4942	5048	102.14
6.	Danlando	2876	2936	102.09
7.	Germanujo	7085	7201	101.64
8.	Svislando	2103	2136	101.57
9.	Finnlando	2525	2495	98.81
10.	Italujo	4253	4190	98.52
11.	Norvegujo	1677	1650	98.39
12.	Japanujo	3265	3180	97.40
13.	Hispanujo	2557	2490	97.38
14.	Britujo	6661	6353	95.38
15.	Brazilo	4142	3771	91.04
16.	Belgujo	2006	1695	84.50

Konkurso II

1.	Argentino	505	905	179.21
2.	Aŭstralio	1148	1223	106.53
3.	Israelo	285	300	105.26
4.	Kanado	746	769	103.08
5.	Aŭstrujo	1440	1475	102.43
6.	Nov-Zelando	1184	1172	98.99
7.	Portugalujo	515	505	98.06
8.	Madagaskaro	250	241	96.40
9.	Islando	250	215	86.—
10.	Sudafriko	250	195	78.—
11.	Urugvajo	250	155	62.—

Letero al vi

Oktobro. La 20-an de oktobro. Aŭtuno. En Pollando, mia patrujo, oni diras "la orkolora pola aŭtuno"... Kurantjare eraras onidiro. La somero ne favoris, la aŭtuno ne favoras. Nu, mi konsentas, ke arbofolioj estas belege oraj, vinruĝaj, flava-rozaj, brunaj; preskaŭ ili jam ĉiuj kuŝas sub arbaroj, sur vojetoj. Tamen la hodiaŭa vetero estas ege trista, deprimema: malhele, malvarme, malseke.

Kion do fari dum tia tago, se iu malsanas (jam de longe), tute ne kapablas tro labori, kaj pro tio havas multe da tempo? Sekve mi decidis konvene utiligi la situacion kaj skribi leteron al Vi! Jes, ĝuste al VI, Samideano (-ino), kies manoj jen tenas Esperantorevuon. Iom stranga letero: en certa senco ĝi estas "antaŭ-venĝo". Nome, mi turnas min al Vi kun grava, granda peto. Eble por pruntedoni al mi monon? Neniam! Cetere mi ne prunteprenas, ĉar mi ne havus monon por redoni ŝuldon. Estas tute alia afero: mi profundkore, tre varme kaj insiste petas ke Vi skribu al mi vastan leteron, sinceran, senfalsan, sen iu ajn arta pozo. Iu-ajn-maniere: permaŝine aŭ permane, inke aŭ krajone; sur eleganta leter-papero kun monogramo, aŭ sur kajerkartetoj, eĉ sur komerca paperpeco kun firmaa presaĵo. Ne gravas. Temo gravas, pensoj gravas, vero gravas kaj homa koro.

Ankaŭ ne estas konsiderinda, kio Vi estas: afrikanoj, amerikanoj, aŭstralianoj, azianoj, eŭropanoj, kie ajn vi loĝas ie en la mondo, oriente aŭ okcidente, norde aŭ sude — skribu! Sendepende de nacieco, haŭtkoloro, religio, mondkoncepto, profesio, instruiteco! Min interesas Via ĉiutaga vivo, simpla — ordinara — kutima vivo, homa vivo.

Estas Vi eble la feliĉa fianĉo? Ho, skribu al mi pri tiu ĉi la plej bela junulino de la mondo, pri ĉi tiu "Miss Universum", ĉar Vi ŝin elektis! Estas Vi la bedaŭrinda, perfidita edzino? Tuj skribu al mi pri tiu fripono!

Kio ajn Vi estas: kuracisto, pastro, lernanto, sciencisto, kudristo, ministro aŭ pordisto (kompreneble ankaŭ ĉiuj -inoj) — SKRIBU, nepre legeble kaj laŭ ebleco rekomendite, por ke letero min certe atingu. El inter Viaj landaj poŝtmarkoj elektu tiujn la plej karakterizajn por Via lando, bone? kaj la pagendan afrankon tutigu per kelkaj iomete valoraj poŝtmarkoj, ke estu da ili kiel eble plej multe.

Kie ajn Vi loĝas, Kara, ĉe Nilo aŭ apud Amazona Rivero, ĉe lazura Adriatiko aŭ sub Himalaja "Tegmento de l'mondo" — Tibeto, en Japanujo, Hindujo, aŭ en "nigra kontinento" Afriko tuj ĉe ekvatoro — nepre skribu. Pri kio? Karaj gesamideanoj, permesu, ke mi ion konfesu: mi vizitadis lernejon, do mi bone scias, ke — ekzemple — en Afriko vivas krokodiloj, etendiĝas Saharo, staras Piramidoj... Ke en Aŭstralio saltegas kanguruoj, ke en praarbaroj interbranĉe petolas niaj agrablaj parencoj (simioj)... Ke en Ameriko — ne, sufiĉas, Vi jam komprenis. Sekve: skribu pri Via vivo, tago, ĉirkaŭularo, laboro, plaĉo, prizorgoj, klopodoj, doloroj, ĉagrenoj, pri ĝojo kaj ridado. Se Vi estas soleca (kiel ankaŭ mi mem), skribu, mi Vin bonege komprenos. Amas Vi iun, malamas, malŝatas? skribu! Ĉio, absolute ĉio estas al mi ege impresa temo.

Ne evitigu al mi la malgajajn leterojn. Mi propripertis ja, ke dum la vivo elrevigas ĉio kaj ĉiu: kredo, espero, amo, amikeco, revo, projektoj, amata viro — virino — amiko, familianoj, eĉ ankaŭ (okazas! okazas!) la propra patrino. Jes, prave "homo solece mortas"... Ankaŭ solece ĝi vivas, kvankam kelkfoje ĉirkaŭita de hejmanaro... solece suferas, sopiras, atentigas sian nekonatan sorton, imagan feliĉon. Genia pola poeto Adamo Mickiewicz, aŭtoro de "Sinjoro

Tadeo", diris en iu sia verko: "Por min kompreni, oni devas esti ne Ĉ E mi, sed E N mi." Prave, tiele.

Malgraŭ tio skribu senprokraste, sincere, vastege, pri ĉio, kio estas V I A.

Al kiu? Ĉefine Vi trovos miajn antaŭnomon, nomon, adreson, kaj Vi sciigos, kiu mi estas. Kio? Bonvolu, ke mi prezentu min! Mi estas homo, se Vi preferas: homino..., plenaĝa, blondhara, iom malsana, tamen ne tro grave, mi pezas 49 da kg-j; instruita? ho, alte, kiel mem "barono Münchhausen", kaj same bonedukita... Laŭ profesio mi estas tajpistino kaj ĵurnalistino (iam, iam, nune — nenio). Aliaj detalaĵoj: mi pasie briĝ-kartludas... Tamen nur sporte, senmone, mi neniam pagas, se mi malgajnis. Krome, mi amas la tutan homaron, do mi esperantistiĝis. Mi rekte freneze amas la Naturon, safiron de ĉielo kaj akvoj, verdon de plantoj, multkolorcon de floroj; precize rozo "reĝino de floroj" estas al mi vera miraklo, do se Vi havas rozplantejon skribu multe, ne timante min enuigi. Same — pri vinberejoj! Pri agrokulturaj bienoj (hallo, danoj!). Amerikanoj skribu pri sia "business"; bestbredantoj — pri siaj "karuloj", ĉar mi egale amas ĉion, kio havas kvar piedojn aŭ du flugilojn. Ja hundo estas kortuŝa estaĵo... Eble Vi havas hejme leonon aŭ tigron? Fenomeno! Skribu al mi.

Espereble mi ricevos malpli ol cent leterojn. Ja ESPERANTO-revuo estas legata en 82 landoj... Ne forgesu meti daton, antaŭnomon, nomon kaj adreson, land-nomon, urbon aŭ vilaĝon. Se tio ne ĝenas, aldonu vian aĝon, kaj — nepre — Vian sekson, ĉar fremdeco de antaŭnomoj povas kaŭzi, ke mi ekopinios viron virino, kaj inverse.

Mi atentados leterojn. Se la leter-kampanjo sukcesos — mi mencios la Skribintojn en nia revuo, dank'al toleremo de la redaktoro. Do serĉu vian nomon, se Vi estos skribinta. Eble la letero ne atingis min, tio okazas.

Finante jen, mi antaŭdankas al ĉiuj miaj Korespondantoj-Amikoj. Estu sanaj, riĉaj, kvietaj, feliĉaj. Vi ĉiuj karaj Gefiloj de la terglobo. Mi forte premas Viajn manojn, kaj ĉies vizaĝon mi kisas fratinece, virinajn kaj virajn. Favoru al Vi bonsorto. Memoru: skribu tuj, sincere kaj vaste, pri ĉio kio okazas ĉe Vi, kun Vi, en Vi, skribu al:

Maria Hessel, Kraków-Pollando (Eŭropo)

ul. Dietla 50/11.

Adresu skrupule, precize!

Via, Maria

ESPERANTO-KALENDARO

Kiel en antaŭaj jaroj, tiel ankaŭ por 1963 s-ro Karl-Heinz Mischler (Franklinstr. 29, ZÜRICH 50, Svislando) eldonis belegan grandformatan kalendaron Por ĉiu monato estas unu belega kolorfoto, kaj sur la dorso estas klariga teksto pri la bildo en Esperanto. Kiu jam vidis tiun ĉi kalendaron, de kies disvendado la profito iras al esperantaj laboroj, tiu ne bezonos instigon mendi jam nun la kalendaron 1964. Por mendantoj ekster Svislando la kosto ĝis la 30a de aprilo estas sv.fr. 4.50 aŭ 9 rpk, post tiu dato ĝi estos 5.50 sv.fr. aŭ 11 rpk (ambaŭ inkluzive afrankon). Vere malmultekosta kaj inda aĉetaĵo, kiu samtempe bone propagandas la Internacian Lingvon!

LA HARISTO

(skizo el la pariza vivo dum la "bela epoko")
de J.-K. HUYSMANS (1848-1907)

Oni sidigas sin antaŭ spegulego, randumita per mahagono; sur apuda marmorplato kuŝadas harlavaĵoj enbotele, rizpudraj skatoloj el blua vitro, kapbrosoj kun graseŝmiritaj haregoj, kombiloj pikaj kaj harozaj, pomadpoto malfermita kaj montranta la markon de fingro stampita en flava pastaĵo.

Tiam la supermezura turmento komenciĝas.

La korpo estas envolvata en negliĝo, tualet-tuko estas kunpremata kiel remburajo inter la kolkarno kaj la ĉemizkolumo, kaj sentante eke- liĝi ĉe la tempioj la etan ŝviton de l'senspiriĝo, oni ricevas ekpuŝon de mano kiu kuŝigas vian kranion dekstren, kaj la frido de l'ŝero tremi- gas vian epidermon.

Je la brua klaktintado de l'feraĵo kiun la tondisto movadas, la haroj disfalas kiel pluvo, glitas en la okulojn, lokiĝas sur la palpebrojn, algluiĝas ĉe la lipanguloj, kiujn ili tiklas kaj pikas, dum nova manpuŝo subite kuŝigas vian kranion sinistren.

Kapon dekstren, kapon maldekstren, fikse. Kaj tiu iro kaj reiro daŭras, pligravigita de la galopo de l' tondilo, kiu manovras ĉirkaŭ la oreloj, kuras sur la vangoj, ekvundetas la haŭ- ton, vojiras laŭ la tempioj, baras la okulon kiu strabas, duonblindigita de tiuj helaj eklumoj.

— Ĉu sinjoro deziras legi gazeton ?

— Ne.

— Bela vetero, ĉu ne, sinjoro ?

— Jes.

— Depost jaroj ni ne havis vintron tiel mildan.

— Jes.

Poste, haltmomento; la funebra ĝardenisto eksilentis. Li nun tenas vian kappostaĵon inter ambaŭ siaj pugnoj, kaj jen, spite la malpli dis- kutitaj leĝoj de l'higieno, li balancas ĝin, su- pren, malsupren, tre rapide, klinante sian bar- bon sur vian frunton, elspirante sur vian viza- ĝon, ekzamenante en la spegulo ĉu la tonditaj haraĉoj estas bone samlongaj; jen li tondumas, ĉi tie, malĉitie, ankoraŭ, kaj li rekomencas kaŝludi kun via kapo kiun li provas perpreme enirigi en vian stomakon, por pli bone juĝi pri la rezultato de sia tranĉado. — Ha ! kie do estas la bonfaroj de la scienco, la anesteziloj laŭditaj, la palaj morfinoj, la fidelaj kloroformoj, la pa- cigaj eteroj ?

Nun, la haristo spiregas, senfortigita de siaj penoj, blovas kiel bovo, kaj ree sin ĵetegas al via kapaĉo, kiun li nun rastas per malgranda kombilo, kaj rabotas senhalte per du brosoj.

Sopiron de korpremeco vi ellasas dum, for- metante siajn striglilojn, li skuas vian negliĝon.

— Ĉu sinjoro deziras parfumfroton ?

— Ne.

— Kaplavon do ?

— Ne.

— Sinjoro estas malprava, tio firmigas la kaphaŭton kaj detruas la skvametojn.

Per mortanta voĉo, oni fine akceptas la kap- lavon, laca, venkita, ne plu esperanta sin for- savi vivanta el tiu fikaverno.

Nun roso fluas, guto post guto, sur vian hararaĉon, kiun la viro, kiu suprenfaldis siajn manikojn, frotpurigas; baldaŭ poste tiu roso, kiu malbonodoras je oranĝaĵo, iĝas ŝaumo, kaj mirkonsternita oni sin ekvidas en la spegulo, kapvestitan per kvazaŭ neĝovaĵo, kiun dikaj fingroj krevigas.

La momento venis, kiam la turmento atingos sian plejegan akrecon.

Malmilde via kapo flirtas kiel sur reĵetiloj inter la brakoj de l'pomadulo kiu blekas kaj baraktas; via kolo krakas, viaj okuloj ŝprucas, la kongesto komenciĝas, la frenezo minacas. En lasta eklumo de natura saĝo, en lasta preĝo, oni humile petegas la ĉielon, ke ĝi vin senha- rigu, ke ĝi vin faru kalva kiel bovidkapo !

La operacio tamen finiĝas. Oni sin levas ŝan- celiĝante, pala kiel post longa malsano, gvidata de la turmentisto, kiu precipitigas vian kranion en lavujon, ĝin ekkaptas ĉe la nuko, ĝin asper- gas per grandaj fluoj de malvarma akvo, poste ĝin forte kunpremas per tuko, kaj ĝin reportas sur la apogseĝon, kie, simila al brogita viando, ĝi kuŝas senmove, tre blanka.

Plu restas nur, post la kruelaj doloroj rice- vitaj, suferi la naŭzon de l'finaj manipuloj, la peĉŝmiraĵon dispremitan en la manplatoj kaj algluitan sur la kranion ree skrapatan de la dentoj de l'kombiloj.

Estas finite, oni estas savita, staranta, libera; oni forpetas la proponojn pri sapo kaj tualeta- ĵoj; oni pagas kaj oni forkuregas el la danĝera fiejo, sed en la freŝa aero, la frenezeto foriĝas, la ekvilibro revenas, la pensoj trankvile repre- nas sian vojon.

Oni sin trovas pli bonfarta, malpli nejuna. En la sama tempo, kiam li sarkis vian felon, la barbiro kiel per miraklo vin malpliŝarĝis de pluraj jaroj; la atmosfero ŝajnas pli milda kaj pli nova, animfreŝo ekaperas, sed ĝi velkas, ve ! preskaŭ tuj, ĉar ekjukas la fortranĉitaj haroj falintaj sub la ĉemizon. Kaj lante, portanta la ĝermon de korizo, oni revenas hejmen, admi- rante la ĉiaman heroecon de l'monaĥoj kies karno estas, nokte kaj tage, memvole gratata de l'akraj haregoj de la duraj punvestoj.

el la franca esperantan de :

Paul LOBUT

LA KONSULTAJ RILATOJ DE U.E.A. KUN UNESKO

En la Esperanto-gazetaro plurfoje aperis informoj pri la Konsultaj rilatoj de UEA kun UNESKO, en kiuj la preciza enhavo de tiuj rilatoj ne estis tute korekte prezentita. Ofte okazis, ke ankaŭ en nacilingvaj revuoj aŭ gazetoj aperis misprezentoj. Tial estas oportune doni la sekvantajn klarigojn:

Kiel konate, la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo (1954) akceptis la 10-an de Decembro Rezolucion favore al Esperanto. La teksto de tiu Rezolucio troviĝas en ĉiu Jarlibro de UEA ekde 1955. La sama Ĝenerala Konferenco unuanime decidis establi Konsultajn Rilatojn kun UEA. La menciita Rezolucio kaj la decido pri la Konsultaj Rilatoj estas du malsamaj aferoj. La Rezolucio estis respondo de UNESKO al la Peticio, kiun siatempe subskribis 895.432 individuaj personoj kaj 492 organizaĵoj kun entute 15,454.780 membroj. La decido pri la Konsultaj Rilatoj estis rezulto de efika agado de UEA sur kampoj, kiuj interesas ankaŭ UNESKO-n.

En tiu tempo ne ekzistis apartaj kategorioj de konsultaj rilatoj. Nur poste, kiam ĉiam pli granda nombro da internaciaj organizaĵoj ricevis la konsultajn rilatojn, montriĝis necesa la kategoriigo de la diversaj organizaĵoj. Post multaj diskutoj kaj interkonsiliĝoj kun la neregistaraj organizaĵoj, la 11-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Parizo en 1960, akceptis la novajn Direktivojn koncerne la Rilatojn de UNESKO kun Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj. Laŭ tiu direktivo ekzistas tri kategorioj de neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO: A, B kaj C.

La kategorio C estas la plej malforta. Organizaĵoj, allasitaj al tiu kategorio, havas nur "rilatojn de reciproka informado". Tiuj organizaĵoj devas regule informadi la Ĝeneralan Direktoron pri sia agado kaj sciigadi siajn membrojn pri tiuj punktoj de la programo de UNESKO, kiuj povas interesi ilin. Aliflanke, la Ĝenerala Direktoro de UNESKO devas prizorgi interŝanĝon de informoj kaj dokumentoj kun la organizaĵoj de kategorio C kaj povas inviti ilin sendi observantojn al iuj kunvenoj de UNESKO.

La organizaĵoj en "rilatoj informaj kaj konsultaj" (kategorio B) havas, krome, jenajn devojn kaj rajton: Laŭ la peto de la Ĝenerala Direktoro ili devas doni sian konsilon kaj helpon en ligo kun enketoj studoj aŭ publikaĵoj de UNESKO, kiuj rilatas al iliaj kompetentecoj; ili ankaŭ devas kontribui al la realigo de iuj partoj de la programo de UNESKO kaj, se iel eble, meti en la tagordojn de siaj kunvenoj punktojn, kiuj rilatas al tiu programo; fine, ili devas inviti UNESKO-n reprezentiĝi ĉe tiuj kunvenoj, kies tagordo estas en ligo kun la programo de UNESKO, kaj prezenti al la Ĝenerala Direktoro periodajn raportojn pri la helpo donita al la realigo de la programo. Krom la rajtoj, kiujn havas la organizaĵoj en la kategorio C, tiuj ĉi organizaĵoj en konsultaj rilatoj B rajtas ricevi de la Sekretariato la tutan dokumentaron rilatantan al la programo de UNESKO en la punktoj, kiuj respondas al la celoj de tiuj organizaĵoj laŭ iliaj respektivaj statutoj. La Ĝenerala Direktoro devas konsulti ilin pri la propono de la programo. Same tiel ili devas esti invititaj sendi observantojn al ĉiuj kunvenoj de UNESKO pri demandoj de ilia kompetenteco kaj, se ili ne povas sendi observantojn, ili rajtas skribe esprimi sian opinion. Konforme al specialaj kondiĉoj ili povas ricevi ankaŭ subvenciojn. La organizaĵoj de kategorio B rajtas partopreni ĉiujn konferencojn de neregistaraj organizaĵoj.

La kategorio A nomiĝas "konsultaj kaj asociaj rilatoj". La organizaĵoj de tiu kategorio devas plej intime kunlabori kun UNESKO en la plenumado de tiuj celoj, kiuj aparte interesas UNESKO-n, kaj helpi al UNESKO en ĝiaj klopodoj internacie harmoniigi la agadojn de neregistaraj organizaĵoj, laborantaj sur komuna kampo. Tiuj organizaĵoj havas, krom la avantaĝoj donitaj al la kategorioj A kaj B, ankaŭ la rajton havi oficejojn je plej favoraj kondiĉoj, se la Sekretariato devas esti kun ili en konstanta kontakto.

Ekster tiuj 3 kategorioj troviĝas tiuj organizaĵoj, kun kiuj la Ĝenerala Direktoro povas havi en la nomo de UNESKO neformalajn rilatojn, kiam ajn li tion opinias utila el la vidpunkto de la interesoj de UNESKO. Efektive, do, ekzistas 3 kategorioj de formalaj rilatoj kaj 1 de neformalaj, entute 4 kategorioj.

Pri la akcepto de iu organizaĵo en kategorion C decidas la Ĝenerala Direktoro, dum la Plenuma Komitato de UNESKO estas kompetenta por la decido ĉu iu organizaĵo estos akceptita en la kategorion A aŭ B.

Okaze de la unua kategoriigo, fine de 1961, Universala Esperanto-Asocio tuj ricevis la kategorion B. Necesas ĉi tie diri, ke nur 22 internaciaj organizaĵoj ricevis la kategorion A.

Al tiu grupo apartenas ĉefe organizaĵoj kreitaj kun la helpo de UNESKO mem, ekzemple la Internacia Konsilantaro por Filozofio kaj Humanismaj Studoj, Internacia Konsilantaro de Muzeoj, Internacia Konsilantaro de Sciencaj Unuiĝoj k.s. Al la kategorio B apartenas nur la plej gravaj internaciaj organizaĵoj, ekzemple la Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Docentoj, Internacia Konsilantaro de Virinoj, Internacia Federacio de Ĵurnalistoj, Asocio de Internacia Juro, Internacia Federacio de PEN Kluboj kaj similaj. Al la kategorio C apartenas aliaj gravaj organizaĵoj, ekzemple la Rotary Internacia, Internacia Komitato de Scienca Organizo, Internacia Ligo de la Homaj Rajtoj, Savarmeo k.a.

Kiel oni vidas, dank' al efika kunlaborado de UEA kun UNESKO dum pluraj jaroj, Universala Esperanto-Asocio ricevis novan elstaran pozicion en la eblaj konsultaj rilatoj kun UNESKO.

MALLONGAJ INFORMOJ

"*Oriento kaj Okcidento*", verketo de Georges Fradier, eldonita de UNESKO en diversaj lingvoj, nun aperis ankaŭ en la Esperanto-traduko de C. D. A. Capp kiel eldonaĵo de UEA, finance subvenciita de UNESKO. La 50-paĝa libro, bele ilustrita, estas havebla de la C.O. de UEA por la prezo de 1,50 gld. aŭ 5 internaciaj respondkuponoj aŭ 6 steloj.

S-ro R. Pennazio, kunlaboranto de CED, ellaboris trarigardon pri ĉiuj stratoj aŭ placoj kun la nomoj Zamenhof aŭ Esperanto laŭ la stato je la 31-a de oktobro 1962. Entute nun ekzistas 217 stratoj aŭ placoj je tiuj nomoj en 19 landoj. Kompleta listo aperos en unu el la sekvantaj numeroj.

"*La Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj*", prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna, farita en la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, aperis en Esperanto kiel dokumento de CED A/II/1. Same tiel aperis lia resuma raporto pri "Kelkaj Aspektoj de la Lingva Problemo en Internacia Publika Juro kaj Kompara Juro", kiel dokumento de CED A/II/2. Tiuj dokumentoj jam estas senditaj al la landaj asocioj kaj komitatanoj de UEA. Ili estas mendeblaj ĉe la C.O. de UEA je la prezo de 3 respondkuponoj por ambaŭ.

DONACOJ DE CED

	£	ŝ	p
La stato je la 31-a de oktobro 1962	145-	3-	11
S-ro E. F. Dean, Britujo	2-	2-	0
F-ino E. M. Robertson, Britujo	1-	0-	0
F-ino N. Hanson, Britujo	1-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ro Huddersfield	1-	15-	0
F-ino M. Boulton, Britujo	1-	0-	0
Gesinjoroj H. W. Holmes, Britujo	4-	0-	0
S-ro H. Groendijk, Nederlando	0-	10-	0
S-ro H. Anaral, Portugalujo	0-	17-	7
S-ro M. de Freitas, Portugalujo	0-	10-	4
S-ro A. Santos, Portugalujo	0-	5-	0
N.N.	4-	0-	0
Esperanto-Asocio en Madagaskaro	0-	15-	0
Itala Esperanto-Asocio, Italujo	16-	4-	0
S-ro A. Santos, Portugalujo	0-	6-	10
Torina Grupo Esperantista, Italujo	20-	4-	0
S-ro J. Th. de Goeij, Nederlando	0-	10-	0
S-ro Sjöblom, Svedujo	2-	10-	0
N.N.	0-	1-	0
S-ro A. Su, Ĉinujo	0-	1-	7
La stato je la 3-a de decembro	207-	16-	3

Ĉifoje CED aparte esprimas koran dankon al Torina Esperantista Grupo kaj al Itala Esperanto-Asocio pro iliaj malavaraj donacoj. Tio montras ke ili atente sekvas kaj aprobas la agadon de CED. CED ankaŭ tutkore dankas al ĉiuj aliaj, kiuj subtenas finance ĝian laboron. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj aŭ rekte la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

RICEVITAJ LIBROJ

H. C. Andersen: LA MARVIRINETO. El la dana trad. Ib Schleicher. Antaŭparolo kaj biografio de Mag. Svend Larsen. Eld. KOKO, Kopenhago, 1962. 75 paĝoj, el kiuj 20 estas tutpaĝaj kolorilustraĵoj de Gustav Hjortlund, kaj 8 tutpaĝaj reproduktaĵoj de freskoj de Niels Larsen Stevns. 27 × 21 cm. Prezo: 15 d.kr. (30 steloj).

MEMORAĴOJ PRI HO CHI MINH. Trad. la esp-klubo en Hanojo. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1962. 251 p. 19 × 13 cm. Prezo nemontrita.

Daniel Quarello: SÍNTESIS DE ESPERANTO PARA PRINCIPIANTES. Eld. Quarello, Buenos Aires, Dua eld., 1962. 118p. 17.2 × 11 cm. Prezo: 9 steloj, aŭ interŝanĝe.

BIRDOJ KAJ BESTOJ SUR POŝTMARKOJ. Albumeto. Eld. "Nia voĉeto", 4 Queen Street, Chesterfield, Anglujo, 1962. 32p. 20 × 15.5 cm. Prezo: 4 steloj (en Britujo 4.5 steloj).

Mendu jam nun vian binditan Jarkolekton 1962 de la revuo


' ESPERANTO '

Prezo: por nemembroj: 10,50 gld. (42 steloj)
por MA 1962: 5,25 gld. (21 steloj)

Novan jaron oni komencas kun novaj promesoj kaj intencoj

Unu el la viaj estu kaj realiĝu:

Aĉetu ĉiumonate almenaŭ unu Esperanto-libron, libreton, broŝuron aŭ kajeron. Vidu la ampleksan libroliston en la Jarlibro de U.E.A. !



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT,
Jugoslavio.

POR LIBERIGI INICIATEMON...

Jen ni havas la jaron 1963. Ĝi estas la 8-a jaro de la ekzisto de TEJO kaj la 25-a jaro de la organizita internacia junulara agado en la Esperanto-Movado. Tiu ĉi jaro ne estas ordinara laborjaro de TEJO: UEA kaj TEJO kune anoncis ĝin kiel JARON de la JUNULARO en la ESPERANTO-MOVADO.

Vi mem spertis, ke kvankam ekzistas multaj junaj esperantistoj, la agado de TEJO ne estas facile rimarkebla. Oni povus prezenti multajn kaŭzojn: TEJO mem ne laboris bone, sed ankaŭ vi — gejunuloj — ne sentis bezonon ŝanĝi tiun staton. Tiel naskiĝis la ideo pri la propra kampanjo de TEJO: *la Jaro de la Junularo*, kiun la Komitato de TEJO dum la 18-a IJK en Ystad aprobis.

Kion ni intencas fari? La ĉefa tasko de la *Jaro* estas aktivigi ĉiujn gejunulojn en la landaj E-asocioj kaj landaj sekcioj de TEJO, liberigi la junularan iniciatemon en la Movado, utiligi ĝin por ĉiuj aktivecoj de UEA kaj fine fortikigi TEJO-n tiel, ke ĝi atingi povon serioze gvidi sian agadon en ĉiuj neesperantistaj junularaj medioj. Nia laboro ne estas ludo de infanoj, nia kampanjo servas ĉiam kaj ĉiel al la ĝenerala movado. Ni ĝin iniciatis, ni scipovas gvidi ĝin tiel, ke ĝi estu sukcesa, sed tio estas ebla nur en kunlaboro kun la landaj asocioj, kiuj disponas pri rimedoj de informado, rimedoj organizaj kaj financaj.

Kion ni atendas de UEA kaj landaj asocioj? Unue ni atendas, ke ĉiu LA agnoskos la kampanjon kaj siaflanke propagandos ĝin sur la tuta teritorio de sia atingopovo. UEA kaj LA kreu tian atmosferon en la movado, ke la junularo sentu sin bezonata, estu invitita al kunlaboro, ricevu apartajn taskojn en la ĝenerala agado. Ŝanĝigantaj mondkonceptoj kaj la aktivigantaj vicoj de TEJO prezentas situacion, en kiu oni ne plu povas pretervidi la fakton, kiu nomiĝas *junularo*. — *La Jaro de la Junularo* estas tamen nur ero de la granda plano de TEJO. La Estraro jam komencis realigadi ĝin. Vastskale ni preparas oratorajn konkursojn, baldaŭ ni anoncos longedaŭran kampanjon NEO (Neesperantistaj Junularaj Organizaĵoj), aperos provekzemplerio de aparta *revuo por la esperantista junularo*. En la jaro 1963 TEJO pligrandigos la nombron de siaj membroj kaj landaj sekcioj, plialtigos nivelon de siaj internaciaj aranĝoj, kio jam fakte okazas.

Ni kredas, ke la *Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado* sukcesos, ni esperas, ke ĉiu plenkreska esperantisto rememorigos al si, ke li/ŝi iam ankaŭ estis juna, kaj ke ĉiu juna esperantisto aktive montros sian ekziston. Kaj ĉion ĉi por la rapida progreso de la Esperanto-Movado, kio estas grava por ĉiuj, sed por la *Esperantista Junularo* — estonto de la Movado — havas principan signifon; ĉion ĉi por realigo de nia nobla ideo — humanisma internaciismo.

Marek W. Pietrzak
Ĝenerala Sekretario de TEJO

PRINCIPOJ ESTAS KLARAJ

Inaŭgurante la Jaron de la junularo en la tutmonda Esperanto-Movado, kion diri pri junularo, kulturo kaj lernejoj? Nenion novan. La principoj estas konataj laŭ la Baza Laborplano de UEA kaj Perspektiva Laborprogramo de TEJO. Tio estas farenda.

Tamen ne malutilos denove tuŝi kelkajn erojn. Ni scias, ke la junularo ĉiujare, eĉ ĉiumonate tralegas montegon da diversaj libroj. Tamen oni neniel povas konstati samon observante la "uzadon" de esperanta literaturo, enhavanta tiom da riĉaĵoj, tiom da perloj, temu pri iu ajn ĝia branĉo. Alproksimigi la esperantan libron al junulo, tiel ke ĝi estu atingebla kaj amata same kiel la libro en la gepatra lingvo, jen la tasko por la Jaro de la junularo! La manieroj efektivigi ĝin estas diversaj. Unu vojo kondukas tra ofte vizitataj publikaj librejoj (legejoj), kiuj posedu ankaŭ esperantajn librojn. Kompreneble la gejunuloj-esperantistoj devas esti informitaj kaj interesiĝitaj pri tio (ĉu estus troa optimismo diri "interesiĝintaj"?). Oratoraj konkursoj estas konataj. Ili estas unika okazo por gejunuloj diri *sian* opinion pri diversaj problemoj antaŭ loka, landa kaj speciale internacia publiko. Dum tiu ĉi jaro nek lokaj, nek landaj organizaĵoj subtaksu ĉi tiun formon de konkurado inter gejunuloj. La temoj estu internacie komunaj kaj prefere samaj aŭ similaj al tiuj por la Oratora Konkurso en Sofio!

Specialan atenton meritas junularaj kulturaj grupoj, kiuj kapablas ion prezenti. Jen tie, jen alie kolektiĝas teatra grupo, kanĥoro, kabaredo.... Tiuj, kiuj restas agantaj kelkajn jarojn kaj prezentantaj kvalitajn kulturajn programojn, ne devos morti se ni kiel TEJO, Landaj Sekcioj kaj pli fundamentaj organizaĵoj ne nur postulos de ili la membrokotizon, sed ankaŭ kunzorgos por ke ili povu pliajn fojojn prezenti kaj atingi reputacion ankaŭ ekster la Esperanto-Movado. Se ie ekzistas kontentige kvalita kultura grupo, kial grava esperantista aranĝo pasu sen ĝia prezentiĝo?

Konsciante pri miloj da gelnantoj, kiuj ĉiujare lernas Esperanton, TEJO kaj ĉiuj aliaj, kiuj laboras sur lerneja kampo devas fari la necesan, ke plej novaj junaj esperantistoj ne forlasu Esperanton. Ĉiu Esperanto-klaso fariĝu ankaŭ grupo! Tia grupo, ke ĝi pro sia laboro postvivis la trijaran Esperanto-instruadon.

Svobodan Zlatnar

KION NI POVAS FARI POR NI

La junularo laboras, lernas, amuziĝas — unuvorte vivas. Sed en diversaj kondiĉoj. La scivolo pri la diferenca vivmaniero de la samaĝuloj estas normala respegulo de tiu diverseco. Plimulto el ni lernis la Internacian Lingvon ĝuste por pli facile kaj pli senpere ekoni la diversajn formojn en kiuj fluas la vivo de foraj, nekonataj homoj.

La ĝisnunaj internaciaj aranĝoj kaj gazetoj de esperantistaj organizaĵoj estis nesufiĉaj por kontentigi la scivolon de la moderna junul(in)o. Tiu ne restis nerimarkita en la Estraro de la Internacia junulara organizaĵo — TEJO. Ĝi diskutis la problemon dum la IJK en Ystad kaj antaŭ ĝi. El la diskuto rezultis la decido: eldoni internacian junularan gazeton en la Internacia Lingvo.

Ĉu vi interesiĝas pri kosmaj vojaĝoj, pri la Olimpikoj en Tokio, pri la filma festivalo en Cannes, pri nova verko de fama verkisto, pri la festivalo de la kanzonoj en Sanremo? Ĉu por vi ne estus interese observi la socian evoluon en unuopaj landoj pere de artikoloj, kiujn verkas tiuj kiuj mem en la evoluo kaj evoluigo partoprenas? Ĉu vi ŝatus legi bonan kaj interesan novelon aŭ amuziĝi per solvado de enigmoj? Ĉion ĉi vi devos trovi en la nova gazeto.

Kompreneble, vi tuj demandos: kiu plenumos la ampleksekan laboron bezonatan por tia entrepreno? Kiu subtenos tian gazeton? Ĉu ĝi ne estas tro granda gluto por nia malgranda buŝo? Sed ankaŭ mi vin demandos: ĉu ni ne havas kompetentajn personojn parolantajn la Internacian Lingvon en Usono, Sovetunio, dise tra la mondo en Eŭropo, Azio, Afriko, Suda Ameriko kaj Aŭstralio? Mi plue demandos: ĉu vi mem ne estas sufiĉe kapabla verki en la gazeto pri via fako, starigi demandojn pri tio kio vin interesas kaj doni proponojn por pli bona enhavo kaj aspekto? Ĉu vi ne pretas oferi parton de via poŝmono por tiel interesa legaĵo? Ju pli da ni legos la gazeton, des pli interesa ĝi povos esti por ĉiu. Ĉu viaj gepatroj ne volonte kontribuas modestan sumon al la fondaĵo de la gazeto por lanĉi ĝin en la mondon?

Ĉiutage senpacience mi atendas la leterportiston por ekscii viajn sugestojn kaj proponojn, viajn kuraĝigojn kaj mi esperas, ke li meritos la novjaran donacon.

Flanke de la Estraro de TEJO mi promesas, se vi donos al ni la apogon, prezenti provekzempleron dum

la ĵus komencinta jaro. Ek de la sekvonta vi regule havos en la manoj internacian junularan gazeton, vian gazeton.

Redaktoro

HISPANA ESPERANTO JUNULARA SEKCIO

HEJS organizis la 23-an de Septembro ekskurson tra la bela ĉirkaŭaĵo de la montoj Pola kaj l'Obach. Por efektiviĝi ĝin, renkontiĝis en Tarraso gesamideanoj el Barcelono, Cornella, Manreso kaj Tarraso. La foto montras parton de la partoprenintoj. Maldekstre staras la fraŭlina grupo, kiu partoprenis la eksperimento-Forumon. en Romo, dum la lasta Julio.

SEMOJ ĜERMANTAJ

Sur la sojlo de la nova jaro, nia jaro, la Jaro de la Junularo en la Movado, ni ricevis tre ĝojigajn novaĵojn el diversaj partoj de la mondo.

En la lasta numero ni jam raportis, ke dum la ĉijara Kongreso de Japanaj Esperantistoj kolektiĝis en la Junulara Fakkunsido okdeko da gejunuloj el la tuta JAPANUJO kaj fondis Japanan Esperantistan Junularan Organizon (JEJO).

Malmulte ĝis nun ni sciis pri la junulara movado en USONO. Tamen, ankaŭ tie niaj junaj amikoj ne dormis. En Aŭgusto en Novjorko formiĝis Junularo Esperantista de Nord-Ameriko, kiu konsistas el junaj esperantistoj de Usono kaj Kanado. JEN, kiu jam aperigis du bultenojn sub la sama titolo, kunlaboras kun ELNA kaj ni esperas, ke ĝi konsekvence ligiĝos kun TEJO. Nia Estrarano kaj kasisto Humphrey Tonkin, kiu nun studas en Usono, klopodas ligi JEN kaj la Esperanto-Klubon ĉe Harvard-Universitato. En Francis McClure Junior High School (Longvue Drive, McKeesport, Pennsylvania) ekzistas Esperanto-klubo kun dudek geknaboj, kiujn gvidas Frank Strahl. Se ni rememoros, ke de pli frue ekzistas grupo de skoltaj esperantistoj, Usona sekcio de Skolta Esperantista Ligo (ĉe C. Stanley Otto, 20 Harvard Terrace, West Orange, N. J.), ni vidas firman bazon por plua junulara agado en tiu lando.

La 28-an de Oktobro fondiĝis en BELGUJO landa sekcio, kies sekretario estas Roger Van Humbeek (Ridder, Dessainlaan 3, Mechelen).

La DANA klimato, kiu lastatempe ŝajne ne favoris la junularon, permesis ĉijare fondiĝon al unu junulara grupo en Kopenhago.

Ĉu povis esti pli feliĉa koincido ol tiu ĉe la inaŭguro de la Junulara Jaro? La novefonditaj kluboj kaj sekcioj kiel vivanta pruvo

atestas la kapablon de la junularo transpreni parton de la gravaj taskoj starantaj antaŭ la movado. La semoj jam ĝermas, baldaŭ ili transformiĝos en fortikan trunkon.

Per bildkartoj kaj salutleteroj ni sentigu al niaj novaj membroj, ke ili havas amikojn dise tra la mondo.



LA KONGRESA KOMITATO INFORMAS

Vraca — nia estonta kongresurbo situas 100 km norde de Sofio kaj estas atingebla per vagonaro de Sofio (ĉiutage kelkaj rektaj vagonaroj) kaj de Ruse (kun unu ŝanĝo en Mezdra). Kun Sofio ĝin kunligas ankaŭ unuaranga ŝoseo.

Aperis la Unua oficiala bulteno de la Kongreso, riĉe ilustrita kaj enhavanta aliĝilon. Ĝin ricevos interalie ĉiuj gepartoprenintoj en la lastaj IJK. Petu ĝin de JUNULARA KONGRESO, Sofia, p. k. 587.

En la sonbendo de la 48-a UK (mendebla ĉe la CO de UEA) estas ankaŭ mallonga teksto pri la TEJO-kongreso. Krome, la Kongresa Komitato preparas specialan sonbendon pri la Kongreso en Vraca kaj la Junulara Jaro 1963. Ĝi enhavos ankaŭ apartan koncerton de bulgara muziko kun klarigaj notoj. La sonbendo estos tre taŭga por aranĝo de klubaj vesperoj pri la kongreso kaj TEJO.

Tri vesperoj en la provizora programo de la Kongreso estas rezervitaj por la junaj amatoroj de la kantado, recitado, dancado kaj teatro. Ĉiuj unuopaj esperantistoj aŭ junularaj grupoj, kiuj intencas iamaniere partopreni la belartajn programerojn de la Kongreso estas insiste petataj sin anonci plej malfrue ĝis la fino de Marto. Tio celas nuran orientiĝon de la Kongresa Komitato pri eventuala amplekso de la programoj kaj estas neniel deviga ĉu por la sinanoncintoj, ĉu por la Kongresa Komitato.

La internacian enketon-konkurson "Kion vi scias pri la lando de la 19-a TEJO-Kongreso?" (vd. "Esperanto", Oktobro 1962, p. 184) ĝis nun partoprenis tre malmulte da gejunuloj. Ĉu vi ellasos tiun eblon partopreni la Kongreson en Vraca senkoste? Sendu senprokraste viajn respondojn.

NIA FORUMO

DU EVENTOJ EN LA HISTORIO DE UEA

Dum la ĉi-jara kongreso en Kopenhago okazis du eventoj, kiujn oni rajtas konsideri treege gravaj: Unue la decido eldoni novan revuon "Monda Kulturo" kaj due la elekto al la estraro de UEA de influa industria direktoro, s-ro E. L. M. Wensing.

Aperigo de nova revuo kia "Monda Kulturo" kompreneble estas plia pruvo pri la forto de nia asocio kaj la matureco de ĝia popolo, sed per si mem la apero de la nova eldonaĵo apenaŭ estas epokfaranta, ĉar jam ekzistas aliaj altkvalitaj revuoj kulturaj en la internacia lingvo. Kontraŭe, elekto de speciala estraro pri industrio kaj komerco estas tute nova kaj decidiga paŝo antaŭen, necesa elemento de la multflanka agado de nia asocio por interpopola interkompreno.

Montras la mondhistorio miaopinie, ke tiuj grandaj naciaj lingvoj, kiujn oni hodiaŭ nekorekte nomas "mondaj", akiris siajn poziciojn ne unue kaj ĉefe pro la kultura nivelo de siaj parolantoj, sed tial ĉar la komerco portis ilin, la lingvojn, al multaj partoj de la globo, nur poste sekvata de la kulturo. Simile, en la nuntempo kiam la tekniko vere permesas produktadon kaj distribuon penetrantajn tra la tuta mondo, oni konsciu, ke la kresko de la internacia komerco konsistigas la plej favoran klimaton por la plua disvastigo de la internacia lingvo kaj estas forto nepre utiligenda por tiu celo, multe pli potenca ol "nura" kultura agado internacia. Tial UEA kreu kampanjon kaj komision prikomercajn, tial UEA klopodu pri kontaktoj kun komercaj ĉambroj naciaj kaj internaciaj, tial tre laŭdinda estas la komenco farita per la nova libro de s-ro Bruno Vogelmann, "Esperanto en Komerco", kaj tial vere historia estos tiu jaro, kiam UEA povos komenci la eldonadon de plia revuo, "Monda Komerco".

E. Svane

RESPONDE AL S-INO EMILIJA LAPENNA

La Londona Klubo organizas kvarjaran kurson kiu estas gvidata de S-ro Alec Venture por prepari anojn kiuj deziras partopreni la Licenciatan Ekzamenon de B.E.A. Simile al tiu de U.E.A., ĉi tiu ekzameno postulas grandan scion pri Esperanto, ĝia historio kaj literaturo. La Kluba biblioteko estas je la servo de la kursanoj.

Ĉu la Zagrebaj Klubo ne povas simile fari?

"Londonano"

RAJTIGO DE U.E.A. AL TIBOR SEKELJ

En la tre interesa artikolo de Lic. Tibor Sekelj "Karavano de Amikeco tra Afriko", publikigita en la novembra numero de "Esperanto", troviĝas aserto, ke s-ro Sekelj "ne havas rajtigon de UEA entrepreni seriozajn klopodojn ĉe konvenaj aŭtoritatoj" kaj ke tial li limigas sin "al nuraj 'hazardaj' diskutoj, kie la okazo prezentigas". Kvankam la Karavano, kiun gvidas s-ro Sekelj, ne estas oficiala aranĝo de UEA, tamen UEA, laŭ siaj eblecoj, finance kaj morale helpis kaj helpas tiun entreprenon. La koncernaj vortoj de s-ro Sekelj verŝajne ŝuldiĝas al misformulo de la penso. En ĉiu okazo, por eviti miskomprenojn, en mia funkcio de ĝenerala sekretario, ŝargita pri eksteraj rilatoj, mi tuj informis s-ron Sekelj, ke, tute kompreneble, li povas en sia funkcio de komitatano de UEA entrepreni seriozajn klopodojn ĉe konvenaj aŭtoritatoj, se prezentigas taŭga okazo.

Ĝenerala sekretario

PRI LA INTERNACIA DIPLOMO

En sia artikolo "Spertoj pri la Internacia Diplomo" s-ino Emilija Lapenna plendas pri diversaj aspektoj de la ekzameno. Certe, kelkaj punktoj el ŝia kritiko estas pripensindaj kaj mi ne dubas, ke la Estraro pri Kulturaj Aferoj kaj la Sekretariino de la Internacia Ekzamena Komisiono pritraktos ilin. Tamen, pri aliaj punktoj s-ino E. Lapenna, ŝajnas al mi, estas absolute malprava. Tiu ĉi ekzameno estas la plej alta, kiun havas la Esperanto-Movado, kaj oni atendas, ke la kandidatoj scios mem orientiĝi en la literaturo postulata por sukcesa ekzamenigo. La Sekretariino de la Komisiono helpis per publikigo de listo de studindaj verkoj. Tiuj verkoj devus troviĝi en la biblioteko de ĉiu loka Esperanto-grupo kaj, laŭ la ebleco, ankaŭ en tiu — de la kandidato. Estas bona ideo organizi kursojn por la kandidatoj, sed tion povas fari aŭ la landaj asocioj, aŭ eĉ la lokaj grupoj.

La Londona Esperanto-Klubo havas, ekzemple, altnivelan superan kurson. Tiam kurson siatempe havis ankaŭ la Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb kaj, supozeble, aliaj grupoj. Oni vere ne povas postuli de la Estraro de UEA, ke ĝi eĉ organizu tiaspecajn kursojn, ekzemple en Primošten (Jugoslavio), kiel sugestas la aŭtorino de la artikolo. La Estraro de UEA povas kaj pretas doni helpon, sed tiam aferon oni povas organizi nur en la loko kaj en la lando mem. UEA ne estas nur la Estraro, sed ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj la tuta membraro. Se ni volas progresi ne

nur sur tiu ĉi kampo, sed entute, necesas, ke oni ne atendu ĉion de la 8 personoj en la Estraro, kaj la kelkaj komisiitoj por diversaj agadoj, sed ke ĉiuj niaj organizaĵoj kaj eĉ ĉiuj unuopaj membroj kontribuu proprainiciate al la laboro de la Asocio en la kadroj de la Statuto, Regularoj kaj Laborplano.

Ivo Lapenna

**ĈU VI JAM PAGIS
VIAN KOTIZON 1963 ?
HELPU LA
ADMINISTRADON
PER TUJA REALIĜO !**

Tra la Mondo

Francujo

● **Paska Kultura Semajno** okazos en Kastelo Grésillon sub la aŭspicioj de la Franca Ministerio pri Edukado de la 1-a ĝis la 7a de aprilo. Prelegos D-ro Ivo Lapenna pri "Fundamentoj de la publika parolarto" kaj "Formiĝo de grandaj komunaj lingvoj". D-ro Albaut el Toulouse, Inĝeniero Michling el Gottingen, kaj diversaj konsilianoj de U.E.F. prelegos pri diversaj temoj. 50 geseminarianoj, estontaj geinstruistoj, partoprenos tiun semajnon. Petu informojn de s-ro Micard, Instruisto, Epineux le Sequin (Mayenne), Francujo.

Germanujo

● **Entuziasma esperantisto** estas D-ro Wolfgang Stammberger, Ministro de Justico en la Federacia Respubliko.

Hungarujo

● **La fervojista Esperanto-fakgrupo de Dunakeszi** (Hungarujo) planas okazigi prezenton por invititaj reprezentantoj de ĵurnaloj, Radio, Televido k.a. koncernaj instancoj, pri la progreso de la lingvoscio de komencantoj, instruitaj de 1.10.1962. La prezento okazos la 10-an de Februaro en j. 1963. La grupestro petas venigi il. poŝtkartojn — laŭeble koloritajn kaj karakterizajn — el ĉi. de la mondo al la suba adreso de la fakgrupo, kies geanoj (16-40 jaruloj) deziras kontaktiĝi kun ĉiulandaj geesperantistoj por daŭra korespondado. La estraroj de la diverslandaj Efakgrupoj estas petataj instigi sian anaron helpi al la menciita fakgrupo por sukcesigi ties planon. Al ĉiuj skribontoj — krom la pliposta danko — jam anticipe dankas pro

la solidareco la grupestro de Vasutas Eszperantó Szakcsoport DUNA-KESZI, Gyártelep. Kulturothton, Hungarujo.

Jugoslavio

● **Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino - Magnetofono - amatoroj (ILEF).** Oficiala centro: Lj. Ranĝeloviĉa 21, Bela Palanka, Serbio, Jugoslavio, Eŭropo. Grava alvoko al esperantistoj de la mondo. ILEF alvokas ĉiujn esperantistojn okupiĝantaj pri amatora foto-kino-sonbendo aliĝi en tiun ĉi esperantistan organizaĵon — kompreneble, kiuj tion ankoraŭ ne faris — kaj per sia laboro sur tiu ĉi kampo kontribui al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto. Ĉiu amatori, membro de la Ligo, povas trovi sian lokon en la kadro de la organiza kaj la aga aktiveco laŭ siaj ebloj kaj kapabloj, kiuj nature estas senlimaj. Aliĝi oni povas pere de la landa reprezentanto, aŭ rekte ĉe la centro de ILEF, nepre aldona al aliĝkotizon de ses internaciaj respondkuponoj kaj jarkotizon por la jaro 1963 — dek int. rkp. Aliĝilon oni petu de la ĉefsekretario de la Ligo al jena adreso: S-ro h. prof. Árpád G. Pölöskey, e. ĵurnalisto, Budapest 119, poŝtkesto 6, Hungarujo. Por respondo nepre sendu 2 pecojn de int. rkp. ILEF organizas Foto-kino-sonbendo-konkurson kiu daŭros ĝis la 30-a de junio 1963. La konkursa temo estas: "Infanoj de la Mondo". La fotoj, filmoj kaj sonbendoj meritis esti ekspoziciitaj kaj estos prezentitaj dum la 48-a Universala kongreso de UEA en Sofio venontjare. La plej bonaj ekzempleroj estos premiitaj! Formato de la bildoj estos kutima formato de ILEF ekspozicio 13 × 18 cm. La amatoraj filmoj povas esti 8 kaj 16 mm-roj kaj longeco maksimume 100 m. Sonbendoj povas esti 100 mtr. kun 9.5 cm/sek rapideco. La eksponaĵojn oni ne resendas! ILEF ankaŭ deziras aperigi oficialan organon sub titolo — "LA Verda Foto-kino revuo". Estos necese sendi artikolojn el la foto, kino, magnetofona fako kaj bildojn el la esperantista, junulara kaj infana vivo. Ankaŭ estas dezirindaj la fakaj pritraktoj el la foto-kino-magnetofona tekniko — prefere nigroblanka kaj eble kolora, por ke nia revuo fariĝu ne nur volonte legata, sed ankaŭ instrua kaj samtiel alloga por la neesperantista publiko.

● **Pri la Internacia Konferenco de lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.** La dato de la konferenco: La internacia konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata okazos la 29, 30, 31-an de julio kaj la 1-an de aŭgusto 1963 en Beograd (Jugoslavio). Ĉar la konferenco havas gravegan signifon por la plua enkonduko de Esper-

anto en la lernejoj estas dezirinde ke dum ĝi estu reprezentataj ĉiuj lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata. La tagordo de la konferenco konsistas el jenaj diskutendaj temoj: 1) "Kontribuo de Esperanto al la internacia kompreniĝo", 2) "Kontribuo de Esperanto al la ĝenerala instruado", 3) "Ĝisnunaj organizaj spertoj rilate al la enkonduko de Esperanto en la lernejoj de opaj landoj kaj niaj komunaj taskoj", 4) "Modernigo de E-instruado kaj unuigo de ĉiuj fakaj fortoj je tiu plano", 5) "Okupiĝo pri infanoj kaj junularo ekster la E-instruado". La enkondukan vorton (prelegon-referaĵon) faros la plej eminentaj fakuloj de la Esperanto movado. Krom la labora parto estas antaŭviditaj diversaj kulturaj kaj amuzaj aranĝoj, vizitoj, promenoj ktp. pri kies detaloj bonvolu legi en sekvantaj informoj kaj aparte presita Programo. Krom la reprezentantoj de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata la konferencon rajtas partopreni la oficialaj delegitoj (komisiitoj por la instruado) de opaj landaj asocioj. Estas sugestinde ke la landaj asocioj monhelpe ebligu kaj faciligu al la reprezentantoj kaj delegitoj partopreni la konferencon. La renkontiĝo de la infanoj: La konferencon el ĉiu lando partoprenu ankaŭ 1-2 gelernantoj (8-15 jara) bonege regantaj la lingvon. Por ili estos aranĝita aparta programo en kies kadro okazos Internacia instruohoro modele kaj publike organizita pure en Esperanto. La temo de la instruohoro estos el la branĉo de la internacia edukado. Esperanto ekspozicio: "Esperanto en la servo de edukado". La celo: montri la evidentan utilon de Esperanto por la ĝenerala instruado en la lernejoj kaj edukado. La instruistoj esperantistoj el diversaj landoj estas petataj sendi ion el jena necesa materialo: 3-5 belaj poŝtkartoj, 5 infanaj desegnaĵoj, diapozitivaj aŭ lumbildoj, gramofondiskoj, magnetofonbendoj kun "sonaj leteroj" (kantoj, recitaĵoj, salutoj ktp.), infanaj manlaboraĵoj, skribaj taskoj, nacilingvaj lernolibroj (komenca ABC libro por elementa lernejo, unua lernolibro por ekkoni la naturon), geknabaj gazetoj, papermona unuo de via lando, kolektivaj fotoj kaj ĉio alia kio povus kontribui al la pli bona kono de la ekzistanta nivelo de la instruado kaj edukado en diversaj landoj. Limdato por la aliĝo estas la 1-a de majo 1963 sed estas dezirinde ke la aliĝado finiĝu kiel eble plej baldaŭ. La adreso de la Organiza Komitato: Jugoslavia Esperanto Ligo (por IKL) Terazije 42, Beograd, Pf 201.

Malto

● **Malta Esperanto-Societo**, fondita en decembro 1961, de nun povas kunveni en la Liceo de Valletta, dank' al la Direktoro por Edukado. La Societo petas, ke la esperantistoj skribu mallongan dankleteron al la Direktoro: Mr. J. P. Vassallo, O.B.E., Director of Education, Education Dept., Valletta, Malto.

Sovetunio

● **Vespero dediĉita al la 75-jara jubileo de Esperanto** okazis en la Centra Kulturdomo de Medicinistoj en Moskvo. B. Tokarev prelegis pri la naskiĝo kaj fruaj jaroj de Esperanto. Prof. D-ro Hideo Yagi, Prezidanto de UEA kaj de UMEA salutis la ĉeestantojn kaj rakontis pri sia renkontiĝo kun la konatarusa esp-verkisto V. Eroŝenko en 1917. S-ro Nguen Van Kinh, la ambasadoro de Vjetnama Demokrata Respubliko en Sovetunio atentigis, ke Mongola Popola Respubliko kaj novaj sendependaj ŝtatoj de Afriko estas nun la solaj landoj en la mondo, kie ne estas esperantomovado, tien do oni devas direkti siajn penojn por disvastigi Esperanton. Multaj aliaj kontribuis al primovada kaj arta vespero, kiu taŭge solenis la jubileon.

Svislando

● **"Miss Esperanto"** estis la temo de artikolo kun bildo en "Schweizer Illustrierte Zeitung", rubriko "malgravaĵoj...!"

● **La iniciatintoj de l' Internacia Evangelia Radiosendilo (EPI)** eldonas Bultenon en 8 lingvoj inkluzive Esperanton.

Tanganjiko

● **La Esperanta Flago sur Kilimanĝaro.** Sur sia vojo tra la Afrika kontinento, la "Karavano de Amikeco" "stumblis" je Kilimanĝaro, la plej alta monto de Afriko (6.010 m), kaj decidis surgrimpi ĝin. Post kvartagaj klopodoj, kaj post tranoktado en tri sinsekvaj kabanaj, kaj unu natura groto, kvin el la sep membroj sukcesis atingi la supron de la neĝkovrita estingiĝinta vulkano.

La karavananoj, sub la gvido de la konata jugoslava esploristo kaj prezidanto de IGA, s-ro Tibor Sekelj, hisis kune kun la naciaj flagoj de la ĉeestantoj, ankaŭ la Esperantan flagon. Estas interese rememori, ke estis li mem kiu en 1944 kaj 1945 hisis la Esperantan flageton ankaŭ sur Akonkagvo, la plej alta monto de Ameriko.

Post la ascendo de Kilimanĝaro la Karavano de Amikeco daŭrigas sian vojon pli suden, en plenumo de sia interesa kaj grava programo.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En ta tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 49.88m., 49.38 m., 42.11m., 41.99m., 41.27m., 31.45m., 31.01m. P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m., 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	23.30-23.55	Sofia, 41.35m., 25.32m. P.
	23.40-24.00	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.
	23.45-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 60.30m. (4975 kcs). K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
Lundo	12.20-12.30	Bern, 48.66m., 31.46m., P. (D-ro Baur) Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	17.15-17.30	Valladolid, 203m. (1475 kcs). K. Radio Valladolid, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	16.50-17.00	Wien. 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs) 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 30.90m. (9710 kcs). P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	11.00-11.30	Pjongjang. 360m. (820 kcs), 286m. (1050 kcs), 278m. (1080 kcs), 48.00m. I.P. Centra Radio-Komitato, Pjongjang, Norda Koreo.
	12.20-12.30	Bern. Kiel lunde (Prof. Ecabert).
	17.15-17.30	Valladolid. Kiel lunde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 469m. (640 kcs), 48.54m., 30.72m. I.K. Radio Nacional T. G. W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	06.00-06.15	Gdańsk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul Uphagana 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando.
	08.35-08.45	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs), 242m. (1241 kcs), 222m. (1349), K. Esperanto Ofice, Orléans (Loiret), Francujo.
	21.15-21.25	Bern, 48.66m., 31.46m., 31.07m., 25.61m. P. (D-ro Baur).
	22.05-22.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.15-17.30	Valladolid. Kiel lunde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.20	Hilversum 402m. (746 kcs). P. V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
	22.00-22.10	Valencia, 193m. (1379 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. (11950 kcs), 16.78m. (17.857 kcs), K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde, (Prof. Ecabert).
	22.00-22.30	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.

Radio Roma. 1-I, Tra la literaturo; 4-I, Etruska urbo Tarquinia; 8-I, Novaĵoj el Italujo; 11-I, La itala Renesanco en sia genezo; 15-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-I, Itala belarta urbo Perugia; 22-I, Leterkesto; 25-I, La konvertiĝo de Sankta Paŭlo; 29-I, La itala libretisto A. Ghislanzoni. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella.

Radio Wien jam de 15 jaroj elsendis regule ĉiusemajnan programon en Esperanto. Ne forgesu sendi raportojn pri aŭskultado kaj sugestojn al Radio Wien, Esperanto-fako, Argentinierstrasse 30a, Wien IV, Aŭstrujo.



S O F I O 3-10 VIII 1963

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sofio, 3-10 Aŭgusto 1963

Konstanta Adreso :
UEA., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 4

Rotterdam,
la 22-an de novembro 1962

Novaj Kotizoj :

Ekde la 1-a de januaro 1963 validas jenaj novaj kotizoj :

Kongresano

46.— ned. gld. (16,— lev)

Edz(in)o de kongresano

23.— ned. gld. (8.— lev)

Junuloj malpli ol 20-jaraj

17.— ned. gld. (5.50 lev)

Studentoj de 20 ĝis 30 jaraj

29.— ned. gld. (9.50 lev)

Blinduloj

23.— ned. gld. (8.50 lev)

Komuna Loĝejo :

La Loka Kongresa Komitato aranĝis komunan loĝejon en la studenta kvartalo de Sofio. Tiu ĉi kvartalo konsistas el pluraj domoj kun 3—4-litaj ĉambroj. En ĉiu ĉambro troviĝas lavkuvo kaj gardero. La studenta kvartalo troviĝas en unu el la plej belaj partoj de la urbo, en la proksimeco de la Parko de la Libereco.

10-minuta vojaĝo per aŭtobuso estas la distanco inter la komuna loĝejo kaj la kongresejo. La prezo estas 21.00 ned. gld., por unu semajno. La matenmanĝo, kiun oni povas ricevi en la bone ekipita restoracio de la studenta kvartalo, kostas ĉ. 0.60 ned. gld.

Pliaj informoj kaj la koncerna mendilo aperos en la Dua Oficiala Bulteno.

Hotelaj kaj Restoraciaj prezoj :

Por informo al la interesitoj ni deziras doni kelkajn indikojn pri la prezoj en hoteloj kaj restoracioj en Sofio :

Hotelo kat. "Luksa" (meza prezo)
18.75 ned. gld.

Hotelo kat. "Ekstra" (meza prezo)
7.— ned. gld.

Hotelo kat. "Unua" (meza prezo)
4.20 ned. gld.

Hotelo kat. "Dua" (meza prezo)
3.10 ned. gld.

Bonan, abundan manĝon oni povas ricevi en komforta restoracio je la prezo de 4—6.— ned. gld.

Aŭtomobilistoj :

La ŝoseoj en Bulgarujo estas en tre bona stato : ili estas asfaltitaj aŭ pavimitaj kaj markitaj per internaciaj vojsignoj.

Asekuro de la motorveturiloj en Bulgarujo ne estas deviga, sed estas rekomendite al ĉiuj turistoj posedantaj motorveturilojn fari por ili asekurkontrakton en Bulgarujo. La sumo de la asekura premio dependas de la valoro de la veturilo. La asekurkarton oni povas fari ĉe la landlimo.

La verda asekura karto ne validas en Bulgarujo.

La prezoj de la benzino en Bulgarujo estas : ĝis 72 oktanoj — ĉ. 0.45 ned. gld., pli ol 72 oktanoj — ĉ. 0.60 ned. gld.

La prezoj de la oleoj : ĉ. 3.45, 3.60, 9.60 ned. gld.

Foto-Konkurso :

Dum la 48-a U.K. kaj la 2-a Internacia Arta Festivalo okazos fotoekspozicio je temo "LA HOMO". Ĉiu organizita esperantisto rajtas partopreni la ekspozicion, sendante maksimume kvin fotojn, havantaj minimuman formaton de 13/18 cm. Internacia komisiono de fakuloj prijuĝos la fotojn kaj asignos premiojn al la plej bonaj. Ĉion rilate la fotoekspozicion oni sendu al : Bulgara Esperanto Kino kaj Fotoklubo, P.K. 44 Sofio, Bulgarujo. En venontaj komunikaĵoj kaj en la Dua Oficiala Bulteno aperos pliaj informoj.

Postkongresa Ekskurso :

La Loka Kongresa Komitato aranĝis 5-tagan postkongresan ekskurson al Varna (Nigra Maro) kun haltoj en Târnovo, Ŝipka, Kazanlâk kaj Burgas. Pri tiu ĉi kaj pri la dumkongresaj ekskursoj pliaj informoj troviĝos en la Dua Oficiala Bulteno.

Vizoj :

Por viziti Bulgarujon necesas enirvizo, kiun oni tre facile ricevas ĉe ĉiu bulgara ambasado aŭ konsulejo.

Statistiko (ĝis 21-11-'62) :

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 2, Brazilo 2, Britujo 19, Bulgarujo 29, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 42, Germanujo 13, Hispanujo 3, Hungarujo 2, Israelo 1, Italujo 9, Japanujo 3, Jugoslavio 13, Madagaskaro 1, Monako 3, Nederlando 15, Norvegujo 4, Nov-Zelando 1, Pollando 5, Svedujo 20, Svisujo 3, Usono 2, Entute 210 el 27 landoj (pasintjare ĝis fino novembro : 198 el 27 landoj).

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 353

DELEGITOJ

Belgujo

Liege (Province de Liège) 500.000
FD (Turismo) : S-ro Mathieu Guyot, ŝtata oficisto, rue Che-neux 18.

Brazilo

Governador Valadares (Minas Gerais) 123.000

VD : S-ro Wady Barreto, librotenisto, R. Israel Pinhiero 2696.

São Paulo (São Paulo) 3.825.000

FD (Elektrotekniko) : S-ro Elmo Pereira Nunes, elektrista inĝeniero, Rua Conde Sílvio Alvares Penteado No. 75.

Britujo

Leigh-on-Sea (Essex) 10.000

FD (Kalkulsistemo dozana) : S-ro Brian R. Bishop, ŝtatoficisto, "Blainslie", 106, Leigham Court Drive.

Welling (Kent) 28.000

D : S-ro Alexander William Thomson, emerita komizo, 315, Bellegrove Road.

Ĉeĥoslovakujo

Mnichovo Hradiště-Haškov (Čechy) 4.500

D : S-ro Josef MUDr Hradil, kuracisto.

FD (Medicino) : la D.

Danlando

Bogense (Insulo Fyen)

FD (Hortikulturo) : vakas.

Kolby Kaas (Samsø) 300

D : S-ro E. Henning Olsen, fervoja oficisto.

FD (Fervojoj) : la D.

Francujo

AY Champagne (Marne) 5.500

VD : S-ro Abel Debeaune, 51 Bld Sadi Carnot.

Paris

VD : S-ro Andre Laverre, kontisto, 12, Rue Keufer 12.

FD (Literaturo) : la D.

St. Martin-de-la-Place (Maine & Loire) 1.000

D : S-ro Pierre Métivier, ĝardenisto, "La Flora Domo".

Germanujo

Hamburg 2.000.000

FD (Ekonomia kaj politika sciencoj) : D-ro Werner Bormann, scienca oficisto, Teinstücken 6 g.

Hangelar b/Bonn (Rheinland)

150.000

FD (Komerco) : S-ino Charlotte Holzmann, komercistino-fabrikistino.

Münster (Westfalen)

VD : vakas.

FD (Filatelo) : vakas.

Nürnberg (Bayern) 480.000

D : S-ro Ludwig Pickel, librotenisto, Welserstrasse 69.

Tegernsee (Bayern)

D : vakas.

Walsrode (Niedersachsen) 13.000

D : S-ro Hermann Behrmann, instruisto, Memelstrasse 14.

Japanujo

NOVA ĈEFDELEGITO : D-ro Hideo Shinoda, kuracisto, Kasumi-cho, Yamagata-shi.

Okayama (Okayama-ken) 270.000

D : D-ro Ichiro Arata, kuracisto, 25 Kawasaki-cho.

Kanado

Regina (Saskatchewan) 110.000

D : S-ino Emily Grundsteins, pentrarto, 2915 — 5 th Avenue.

Malto

Vittoriosa 5.000

D : S-ro Carmel Mallia, instruisto, 89, Old Governor's Palace Str.

Nederlando

Amsterdam (Noord-Holland) 872.000

JD : S-ro Hans Bakker filo, inĝenier-konstruisto, Kastelenstraat 231 II.

FD (ŝipkonstruado) : la JD

Arnhem (Gelderland)

FD (Muziko) : vakas.

Den Haag (Zuid-Holland)

FD (Bestprotektado) : S-ro Adriaan Breddels, flordekoristo, Hoogvlietstraat 18.

Heerde (Gelderland) 13.000

FD (Mondfederalismo) : S-ro Uut Medema, oficisto, Wapenvelderkerkweg 10 a.

Warga (Friesland) 1.400

D : S-ino Trijntje de Visser-de Heer, Hilleburen 16.

Winkel (Noord-Holland) 2.200

D : F-ino Dien van Dieren, instruistino, Limmerschouw 6.

Sovet-Unio

Moskva (Rossijskaja FSSR) ĉ. 6.000.000

FD (dentistaj aferoj) : S-ino Anna Efimovna Pipkina, dentkuracistino, B-313, Leninskij prospekt, 90, kv. 121.

Tórva (Estonia) 2.000

FD (Filatelo) : S-ro Lembit Tangsoo, librotenisto, Männiku 14.

FD (Korespondado) la FD (Filatelo).

Svedujo

Hällefors (Västmanland) 8.000

D : S-ro Paul Almén, instruisto, Wigeliävägen 34 a.

Svislando

Lausanne (Vaud) 130.000

VD : F-ino Helene Chavan, eksinstruistino, Rue Etraz 16.

FD (Edukado) : la VD.

FD (Mondfederalismo) : vakas.

Usono

Eau Gallie (Florida)

D : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Giroud, F-ino C., La Chaux-de-Fonds, Svislando. Heilberg, S-ino E.O., San Francisco, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

460. Maillet, S-ino Y, Cormeille en Parisis, Francujo. 461. Real, S-ro Pedro, Paranaí, Brazilo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1963

1. Bluett, S-ro T. L. C., Truro; 2. Dunbar, S-ro Robert, London; 3. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland; 4. Kennedy O. B. E., S-ro F., Angmering-on-Sea; 5. Miller, S-ro J. R., Stone; 6. Murray, S-ro R., Thorpe Bay; 7. Ryan, S-ino Jane S., Manchester, Britujo. 8. Andresen, S-ino H. L., Fredericia; 9. Andresen, S-ro Søren, Fredericia, Danlando. 10. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo. 11. Hollnagel, D-ro Ing. Wilhelm, Hamburg; 12. Jaehn, S-ro Wilhelm, Düsseldorf; 13. Raab, S-ro Johann M., Nürnberg; 14. Wagner, S-ro Hermann, Fürth, Germanujo. 15. Aproso, S-ro Ing. E., Torino, Italujo. 16. Dekinder, S-ro Frenk J., Montreal; 17. Salt, F-ino Betty, Calgary; 18. Tuch, S-ino R., Toronto, Kanado. 19. Bourgeois, S-ro Maurice, Tananarive; 20. Rousseau, S-ro Henri, Tananarive, Madagaskaro. 21. Dijk, S-ro J. P. van Oosterland; 22. Pannenberg, S-ro R., Nieuwe Pekela; 23. Verloren van Themaat, S-ro W. A., Amsterdam; 24. Visser, S-ro J., Marken, Nederlando. 25. Antunes, S-ro J., Lisboa; 26. Serra, D-ro Pedro, Aveiro, Portugalujo. 27. Sedendahl, S-ro Wemer, Uppsala, Svedujo. 28. Ammann, S-ro Karl, Solothurn; 29. DE Sassi, S-ro M., Zürich; 30. Grutter, S-ino L., Samedan; 31. Hohl, S-ro Jakob, Flims; 32. Kuhn, S-ro G., Zürich; 33. Thomas, S-ro Ed., Lyss, Svislando. 34. Heilberg, S-ro Aleksander, San Francisco, Usono.

FONDAJO DOMO

S-ino S. V. Sly, Letchworth, Britujo, 50,— gld.; S-ro A. E. Rosengard Hansen, Middelfart, Danlando, 50,— gld.; S-ro E. Jouis, Boisguillaume, Francujo, 37,50 gld.; S-ro M. Murath, Karlsruhe, Germanujo, 90,— gld.; S-ro I. Dratwer, Ramat Jozef, Israelo, 10,— gld.; S-ro U. P. Ronald, Roxboro, Kanado, 7,20 gld.; Esperanto Asocio de Madagaskaro 15,— gld.; S-ro M. Bourgeois, 7,50 gld.; S-ro Henri Rousseau, 7,50 gld.; ambaŭ en Tananarive, Madagaskaro; Esperanto-Unuiĝo Pacen, Leiden, 25,— gld., Frisa Esperanto-Rondo, Leeuwarden, 50,— gld.; F-ino J. B. Seckel, Almelo, 50,— gld., ĉiuj en Nederlando; S-ino Y. M. Canty, Auckland, 50,— gld.; S-ro W. J.

Dean, 25,— gld., S-ro H. W. King, Mt. Albert, 200,— gld., ĉiuj en Nov-Zelando.

Ĉiuj donacintoj de minimume 50,— gld. estas enskribitaj en la "Ora Libro de la Domo". Malavare donacu por la propra sidejo de la Asocio!

FONDAJO OFICEJA ILARO

S-ro A. Holzhaus, Columbus, Usono, 3,60 gld.

POR VASTIGO DE LA AGADO

(Laŭ Estrara letero de 21.5.1962)

Antaŭa sumo: 11.579,12 gld.

S-ro José Cerato, Cordoba 14,63 gld., F-ino A. Visconti, Rafaelo, 14,30 gld., ambaŭ Argentino; S-ro W. J. Drummond, East Melbourne, 11,93 gld., S-ro S. H. Grant, Port Lincoln, 7,25 gld., S-ro W. Jaeger, Ashfield, 14,91 gld., S-ro S. J. Kelly, West Brunswick, 7,50 gld., S-ro V. Taylor, Canterbury, 39,60 gld., ĉiuj en Aŭstralio; S-ro J. Bierbauer, Kirchbach, 7,— gld., S-ro R. E. Pawlik, Villach, 14,— gld., S-ro O. Sinner, Wien, 8,40 gld., S-ro J. Steinkellner, Knittelfeld, 7,20 gld., S-ro L. Stocker, Knittelfeld, 8,— gld. ĉiuj en Aŭstrujo; S-ro M. Van Aelst, Bruselo, 10,— gld., S-ro G. Gathy, Bierges, 14,41 gld., S-ro F. Mathieu, Bruselo, 7,50 gld., ĉiuj en Belgujo; S-ro J. Gonçalves Vieira, S. Joao da Boa Vista, 7,50 gld., S-ro J. Mauricio da Silva, Belo Horizonte, 7,50 gld., S-ro T. T. Villa Nova, Recife, 10,— gld., ĉiuj en Brazilo; S-ro W. J. Atkinson, Worcester Park, 10,— gld., S-ro B. J. Broadway, Bournemouth, 50,— gld., S-ro A. G. Browne, Mosman, 100,81 gld., S-ro W. J. Kinahan, Twickenham, 10,— gld., S-ro R. Mackay, Edinburgh, 2,50 gld., S-ro D. L. Masterman, Oxford, 7,25 gld., S-ro A. W. Thompson, Welling, 5,— gld., S-ro A. Venture, Sutton, 20,— gld., S-ro J. Wadsworth, 5,— gld., S-ro B. Zeiner, Barry, 10,— gld., ĉiuj en Britujo; S-ro A. Blume Jensen, Glostrup, 7,80 gld., S-ro Holger Hansen, Holbaek, 10,40 gld., S-ro E. L. Jørgensen, 7,50 gld., S-ro S. H. Pedersen, 15,60 gld., E. S. 52,10 gld., S-ro K. Weile, Vedbaek, 1,80 gld., ĉiuj en Danlando; S-ro A. Vuori, Särkisalo, 8,80 gld., Finnlando; S-ro M. Chabert, Parizet, 7,33 gld., S-ro A. Eymard, Sarcelles, 7,32 gld., S-ro M. Fabert, Chelles, 7,33 gld., S-ino B. Garnier, Vichy, 7,33 gld., S-ino E. M. Mage, Lyon, 8,— gld., S-ro P. Marly, Bordeaux, 15,— gld., ĉiuj en Francujo; F-ino A. Conelaar, Wattenscheid, 7,50 gld., S-ro Erlenbach, Berlin, 1,50 gld., S-ino C. Fleischhauer, München, 6,— gld., S-ro E. Geis, Neu Isenborg, 13,50 gld., D-ro W. Groth, Hannover, 18,— gld., Pastro Hans Hagel, Zapfendorf, 8,10 gld.,

S-ro W. Heinrich, Berlin 9,— gld., F-ino Anna Hirsch, Ansbach, 7,50 gld., S-ro A. Jakobsthal 0,60 gld., S-ro G. Jocham, Laupheim, 5,40 gld., S-ino A. Jürgens, Westerrönfeld, 0,60 gld., S-ro Ernst Kind, Stotzheim, 10,35 gld., S-ino J. Kleber, Dachau, 17,96 gld., S-ro H. Klemm, Bingen, 1,05 gld., S-ro J. König, Stockum, 7,50 gld., S-ro R. Matabe, Frankfurt, 9,— gld., S-ro A. Mosch, Erbstetten 9,— gld., S-ro E. Nigmo, Frankfurt, 25,16 gld., F-ino A. Orterer, Kreuth, 27,— gld., S-ro K. A. Richter, Hildesheim, 9,— gld., S-ro Fr. Schottenhammer, München, 9,— gld., S-ro Fr. Schulte, Birgite, 9,— gld., S-ro H. Schuster, Fürth, 6,30 gld., S-ro K. Schweikart, München, 9,— gld., S-ro K. Simon, München, 9,— gld., S-ro H. Spirat, München, 9,— gld., F-ino G. Thenée, Bonn, 9,— gld., S-ro H. Wagner, Fürth 18,— gld., S-ro K. Weil, München, 18,— gld., ĉiuj en Germanujo; S-ro M. Sender, Barcelona, 9,75 gld., Hispanujo; N.N. 100,— gld., S-ro T. Thorsteinsson, Reykjavik, 14,25 gld., Islando; S-ro A. Barbiellini, Torino, 9,— gld., S-ro M. Bardini, Mantova, 7,50 gld., S-ro E. Bergonzoni, Reggio, 8,— gld., D-ro C. Borione, Torino, 8,10 gld., F-ino B. Brogioni, Firenze, 5,80 gld., D-ro V. Canavero, Torino, 9,— gld., F-ino M. Casetta, Torino, 8,10 gld., S-ino Prof. C. Conterno, Torino, 8,10 gld., S-ro L. Dato, Torino, 8,10 gld., S-ro M. de Cassinis, Novara, 15,— gld., S-ro F. Dipasquale, Torino, 9,— gld., S-ro C. Ferrari, Milano, 7,50 gld., S-ro Aldo Formaggio, Torino, 9,— gld., D-ro L. Forneris, Torino, 8,10 gld., S-ro G. Francone, Torino, 9,— gld., F-ino A. Girolidi, Torino, 9,— gld., S-ro G. Malabotta, Torino, 12,— gld., Ing. M. Muretti, Torino, 9,— gld., Prof. S. Panvini, Torino, 8,10 gld., S-ro R. Pennazio, Trofarello, 8,10 gld., S-ro E. Pine, 5,80 gld., Cav. Fr. Ramolfo, Torino, 18,— gld., S-ino G. Salina, Torino, 9,— gld., S-ro A. Tognetti, Firenze, 5,80 gld., S-ino C. Topi, Torino, 18,— gld., Torina Esp. Grupo "Giorgio Canuto" 8,10 gld., S-ro M. Vaio, Torino, 8,10 gld., Prof. E. Zumbo, Torino, 16,20 gld., ĉiuj en Italujo; S-ro H. Shinoda, Yamagata, 100,— gld., S-ro K. Siraki, Ibuki, 7,50 gld., S-ro F. Unoki, Miyako, 10,— gld., Prof. H. Yagi, Okayama, 35,75 gld., ĉiuj en Japanujo; S-ro K. F. Price, Toronto, 15,30 gld., S-ro E. Strutt, Toronto, 36,— gld. ambaŭ en Kanado; F-ino J. S. Aafjes, Rotterdam, 10,— gld., S-ro W. Baaten, Utrecht, 25,— gld., S-ro H. Bakker, Amsterdam, 10,— gld., van Dijk, Kalkfabriek Dordrecht, 10,— gld., S-ino M. Groen-Groot, 5,— gld., S-ro A. K. de Kleine, Zwolle, 10,— gld., S-ro C. W. Klomp, Utrecht, 5,— gld., S-ro

J. Reddingius, Leiden, 8,— gld., S-ino B. M. Slosser-Bresler, Gorinchem, 10,— gld., S-ro R. Slot, Zeist, 7,50 gld., S-ro A. de Vries, Soest, 5,— gld., F-ino A. v. d. Werff, Dokkum, 7,50 gld., F-ino M. J. de Zeeuw, Rotterdam, 7,50 gld., ĉiuj en Nederlando; S-ro A. Berg, Trondheim 15,— gld., S-ino K. Berge, Sauda, 8,50 gld., S-ro A. Berntsen, Vikeland, 25,— gld., S-ro R. Horrisland, Oslo, 12,57 gld., S-ro Åge Roli, Leksvik, 10,— gld., S-ro H. A. Rosbach, Folldal, 7,55 gld., ĉiuj en Norvegujo; S-ro J. K. D. Baker, Tauranga, 7,50 gld., S-ro S. L. Pivac, Matsemota, 17,46 gld., ambaŭ en Nov-Zelando; S-ro J. Makara, Jaroslev, 17,65 gld., Polando; S-ro H. W. Appel, Alberton 30,— gld., S-ro J. Heres, Johannesburg, 10,— gld., ambaŭ en Sud-Afriko; S-ro A. Blid, Nynäshamn 6,95 gld., S-ro B. R. Hjorth, Bromma, 10,42 gld., S-ro G. R. Johanson, Karlstad, 13,95 gld., S-ino A. Nilsson, Stockholm, 10,— gld., S-ino Agda Olsson, Göteborg, 139,— gld., S-ro J. Osterlith, Karlstad, 10,— gld., ĉiuj en Svedujo; S-ro F. Liechti, Bern, 82,63 gld., Svislando; S-ro K. Bonhard, San Diego, 6,86 gld., S-ro J. E. Falk, Heredia, 35,90 gld., S-ro O. Fellner, Pasadena, 10,60 gld., S-ro R. M. Pease, Jersey, 90,— gld., S-ro S. Pflieger, 24,30 gld., S-ro J. Pool, Stanford, 19,92 gld., S-ro Cl. Toro, San German, 3,50 gld., ĉiuj en Usono.

Entute ricevita ĝis 30-11-1962 la sumo de 13.792, 45 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Martinus Instituto instigas al memstara kaj objektiva prijuĝo de la bazaj faktoj en la vivo. Ĝi ne celas al kredo, ĉar kredo ne estas utila en esplorado de faktoj. Petu

senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

S-ro J. L. Fraser (adreso : 37 Witchhill Road, Fraserburgh, Skotlando), blinda fizioterapiisto kaj komencanto pri Esperanto, deziras kontaktojn tra la tuta mondo kun aliaj amatoraj radio-elsendistoj.

Martin Marmeborg, Hyacinthenlaan 88, Bennebroek, Nederlando, 50-jara, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Poŝtkartvespero. — Esperanto-grupo Moyá — Str. Forn, 14, Moyá (Barcelona) — Hispanujo, okazigos ĝin por progresigi la 30 novajn junajn gelernantojn. Skribu amase.

Hispana fraŭlo 18-jara, lernanto de Esperanto deziras korespondi tutmonde kun fraŭlinoj samaĝaj por praktiki la lingvon kaj interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn kaj gazetojn. Speciale kun Latina Ameriko. Certe respondos. Alfonso LOPEZ Llauro — Str. Carretas, 25—1º 2a Barcelona-1, Hispanujo.

Esperanto-Civito estas ĉiam pli subtenata. Fonduso (por aĉeti unuan domon) jam atingis 3.000 stelojn. Venu ekloĝi en Dovro! Simpatiantoj daŭre skribu al D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo. Feliĉan novjaron al ĉiuj geamikoj!

Geknaboj! Via gazeto estas "Nia Voĉeto" — rakontoj, enigmoj, kantoj, artikoloj. Specimeno 1 stelo. Jarabono (4 ekz.) 7 steloj. Speciala prezo por grupoj. Nova serio de albumoj — unua titolo nun preta "Birdoj kaj Bestoj sur Poŝtmarkoj" — kun kelkaj poŝtmarkoj. Unu albumo 4 steloj; pagita antaŭmendo de serio (6 albumoj) 20 steloj. Aliaj titoloj sekvas: "La Sporto", "Arboj kaj Floroj", k.a. Eldonas: "Nia Voĉeto", 4 Queen-St., Chesterfield, Anglujo.

Ni korespondas sonbende! Ni disponas pri magnetofonoj a) du-traka kun rapidecoj 4,75 cm/sek., 9,5 cm/sek. kaj b) kvartraka kun

rapideco 9,5 cm/sek. Grupoj kaj izoluloj bonvolu skribi aŭ sendi bendojn al Esperanto-Grupo Oberkirch en 7602 Oberkirch (Baden), Germanujo Okcidenta.

Okaze kursfinon, organizas ekspozicion de infandesegnaĵoj Esperanto-klubo Les Andelys (Eure), Francujo. Sendu amase antaŭ Junio 1963. Ĉiu kontribuinto ricevos rekompencon.

18-Jara junulino deziras korespondi kun gejunuloj el ĉ.l. per ilustritaj p.k. (vidindaĵoj de urboj k.a.) kaj interŝanĝi fotojn de kino-geaktoroj kaj p.m. F-ino Nadka Ivanova, str. "27 dekmvri" N-ro 10, Karlovo, Bulgarujo.

19-Jara usona studento deziras korespondi kun junaj gestudentoj el ĉiu lando el Afriko, Azio kaj la Pacifika Oceano pri politika scienco, ekonomio kaj la nunaj aferoj de la mondo: Nick Hinchliff, 2517 Reche Road, Fallbrook, California, Usono.

Fredericia Esperanto-Klubo, Danlando, aranĝas meze de marto 1963 letervesperon. Ni afable petas vin, karaj gesamideanoj en la tuta mondo, sendi salutkarton aŭ leteron al mi. Respondo estas garantiata. Adreso: S. K. Nielsen, Havepladsvej 129, Fredericia, Danlando.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Dumas. D-ro Jacky Dumas kaj s-ino Annie (antaŭe Roux) Dumas en Roanne, Francujo, informas kun plezuro pri la naskiĝo de sia filo Yves.

Geedziĝo

Wyber-Bailey. La 7an de januaro geedziĝas en Novzelando s-ro Vilĉjo J. Wyber kaj f-ino Lynette D. Bailey (Esperanto-instruistino). Ĉeestas pluraj esperantistaj gastoj. Adreso: 122 Isabella Street, Invercargill, Novzelando.

LA TEMOJ DE LA ORATORA KONKURSO EN SOFIO

La partoprenontoj en la Oratora Konkurso povos elekti el la sekvantaj temoj:

1. Kiel reciproka aprecado de kulturoj povas helpi al interkompreniĝo inter la popoloj
2. Kion mi opinias pri la Esperanta literaturo
3. Ĉu ekzistas opono inter arto kaj scienco
4. Kiel mi konceptas la rolon de internacia Esperanta teatro
5. Kiel teknikoj helpas al kultura progreso
6. Kio estu la enhavo de kultura agado de la junularo

Por la reguloj pri partopreno vidu la venontan numeron.

LASTMOMENTE

HISTORIA KULTURA EVENTO : LA KOMPLETA DIA KOMEDIO DE DANTE EN ESPERANTO

La kompleta Dia Komedio de Dante, en traduko de Giovanni Peterlongo, kun antaŭparoloj de Prof. Bruno Migliorini, unu el la plej grandaj nuntempaj lingvistoj, Prof. Piero Bargellini, unu el la plej grandaj italaj artkritikistoj, Prof. G. Waringhien kaj Prof. Clelia Conterno Guglielminetti, estas jam kompostita, nun presata kaj aperos komence de 1963, verŝajne jam en januaro. La luksega eldonaĵo kun la ilustraĵoj faritaj por la Dia Komedio de Sandro Botticelli fine de la XV-a jarcento — unika kolekto en la mondo — estos publikigita de "Edizione SIEI-Milano" kaj distribuata de "Le Monnier", Firenze. Ĝi estas eksterordinara eldono en la Serio Oriento-Okcidento de UEA. Detaloj en la sekvanta numero de "Esperanto".

ORIENTO – OKCIDENTO

Eldonis UEA kun la helpo de UNESKO
(vidu CED-rubrikon en tiu ĉi numero)

Prezo : 1,50 gld., 6 steloj

Mendu tuj ĉe UEA !

MONDA KULTURO

Trimonata kultura revuo
Sekvonta numero aperos en januaro

Petu specimenan ekzempleron

Jarabono : 15.— gld., 60 steloj

Mendu ĝin ĉe UEA !

LA ORGANO DE LA INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA ESTAS

espero katolika

fondita en 1903

24-paĝa, ilustrita monata revuo kun aktuala enhavo. Ĝi enhavas aldone ĉiun duan monaton almenaŭ 8 paĝojn el la Sankta Skribo, kun komento, tiel ke oni povas kolekti tiujn aldonojn por poste bindigi ilin. Jarkotizo : ned.gld. 6,— + 1,— por la bibliaj aldonoj. Ĉiu katolika Esperantisto estu membro de I.K.U.E. resp. abonanto de ESPERO KATOLIKA.

Petu provekzempleron ĉe la Centra Oficejo de I.K.U.E.


Frederikstraat 2, Dordrecht (Nederlando)

Poŝtkonto: no. 214009 je la nomo de f-ino Durenkamp

Petu provnumeron !

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo".

Adreso : **Internacia Katolika Informejo,**
Gasthuisstraat 68, TILBURG, Nederlando



LA INTERNACIA AFIŜO

Kvarkolora
Moderna
Kun taŭga
blanka spaco
por naci-
lingva
teksto

Prezoj :

Formato	po	1 ekz.	0.20 gld. (0.80 steloj)
41,5 × 59 cm:	po	100 ekz.	18.— gld. (72.— steloj)
	po	1000 ekz.	165.— gld. (660.— steloj)

Formato	po	1 ekz.	0.40 gld. (1.60 steloj)
58,8 × 83,2 cm:	po	100 ekz.	36.— gld. (144.— steloj)
	po	1000 ekz.	330.— gld. (1320.— steloj)

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo